



# Turka Stelo

La revueto de la turka esperantistaro  
Marto 2020 n-ro: 51



## *Merhaba,*

Dışarıda korona virüsü kolgezerken sizlerin evde kapalı kalarak sıkılmamanız için dergimizin 51. Mart sayımızı hazırladık ve gönderiyoruz. Bu sayımızda da bir birinden ilginç yazılarla karşınızdayız. Tavsiyelerimizden bazıları şunlar:

- Tempo Sigelita
- Oresto-Ifigenia-Krizeisa
- Vendrede
- Homaj Rajtoj (devam yazısı)
- Kain kaj Abel
- Edziĝpropono
- ve ruhunuzu ferahlatacak bir çok şiir

Bu arada korona virüsü, 2017 Aralık 24 nolu sayımızdaki Cadılar bayramı için çevirip yayınladığımız Edgar Alan Poe'nun "La Ruĝa Morto" adlı hikayesini anımsattı. İlave okuma metni olarak okumayanlara tekrar gönderiyoruz.

***Hepinize iyi okumalar !***

## *Saluton,*


Dum ekstere gvatas la kronviruso, por ke vi ne ĝenu enhejmite ni preparis kaj sendas al vi la 51-an martan numeron de nia revuo. Ankaŭ en ĉi tiu numero estas interesaj artikoloj. Kelkaj rekomenditaj tekstoj estas:

- Tempo Sigelita
- Oresto-Ifigenia-Krizeisa
- Vendrede
- Homaj Rajtoj (daŭrigo)
- Kain kaj Abel
- Edziĝpropono
- kaj multaj poemoj por trankviligi via animon

Interalie la kronviruso rememorigis al ni, nian porhaloveno-tradukon de la rakonto "La Ruĝa Morto" de Edgar Alan Poe, kiun ni publikigis en la 24-a kaj decembra 2017 numero de nia revuo. Ni sendas ĝin al vi denove, kiel aldona legaĵo.

***Bonan legadon al ĉiuj !***

SITE DE L'ASSOCIATION DES AMIS DU CDELI



**TURKA STELO**

Eldonanto : Turka esperantistaro

Redakcio : Vasil Kadifeli - vasilkadifeli (ĉe) gmail (punkto) com

Ĉeflingvo:

Esperanto (+turka)

Kodo:

Li-TUR-06

CDELI: Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia - Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds

## Enhavtabelo

Malfermo	1
Enhavtabelo	2
Kursoj	2
Alian Mondon	2
Tago de la Gepatra Lingvo	3
Sumoo	3
UEA	3
TEJO	3
Leteroj de niaj legantoj	4
Krespoj	4
Tempo Sigelita	5
ORESTO-IFIGENIA-KRIZEISA (ΟΡΕΣΤΗΣ-ΙΦΙΓΕΝΕΙΑ-ΧΡΥΣΗΙΣ)	6
Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj (parto 2)	9
Ŝercoj	10
Kurcvortenigmo	10
Vesto	10
La Aŭtunaj Muŝoj (parto 22)	11
Kiel reklami pri nia Lingvo	12
Blogo de Ordemulo	12
Poemoj de Elena Popova	12
Franco KAFKO (Franz Kafka)	13
El la libro de "Dao de Jing" (42)	15
Sun-radio	15
Bildoj el la historio de la Esperanta Literaturo	16
Lupo kaj Gruo	17
Vendrede, la 24-an de januaro 1997	17
Tragedio pro la atombomboj (parto 5)	18
Dr. Isitobi Kozoŭ (parto 5)	18
Poeziaĵoj de Ilir Zhiti	20
Satiraj rakontoj -- de Sándor Szathmári	21
Edziĝpropono	24
Ne forgesu mian voĉon	29
Neandertalaj homoj plu vivas (3)	30
Ni lernu Esperanton!	31
Solvo de la krucvortenigmo	31
Facilaj rakontoj	32

## Kursoj



En la 22-a de februaro okazis kunveno por konatigi Esperanton al nesperantistoj.

## Alian mondon

Kun via animo mistera, lontana,  
min ligas fadeno de sento tenera  
kaj kuras laŭ ĝi el la koro infana  
kurento de mia animo sincera.

Mi skribas al vi la leteron kun ĝojo  
ne nur por saluti vin per bona vorto,  
sed por inter ni estu ĉiam la vojo  
sur ponto liganta la bordon kun bordo.

Mi volas ke nin en la mondo sensenta  
kunigu parolo de l' koro al l' koro.  
Ne venu al ni la soleco turmenta,  
ne ronĝu estinta aŭ nova doloro...

Kun vi, mia kara amiko lontana,  
deziras mi loĝi la mondon unikan,  
kreitan de mia imago infana,  
kaj ĝui en ĝi la feliĉon amikan.



verkis kaj sendis **Gafur Gazizi**  
el Baŝkortostano

Internacia Tago  
de la  
Gepatra Lingvo

21 februaro  
2020

N-ro 849 (2020-02-17)  
**Deklaro de UEA**  
okaze de la  
**Internacia Tago de**  
**la Gepatra Lingvo,**  
**21 februaro 2020**  
(legu pli...)

## Ni atendas leterojn el niaj geamikoj



### Nia revueto atendas leterojn el niaj geamikoj!

Ni invitas ĉiujn geamikojn, ambaŭ turkoj kaj fremduloj, skribi kaj sendi al ni siajn opiniojn pri nia revueto, pri Esperanto kaj pri aliaj aferoj kiel memoroj, reĉenzoj de libroj jam legitaj, vojaĝoj, kongresoj, ŝercoj ktp. Ni aperigos ilin en nia revueto. Bonvolu aldoni vian nomon, aĝon, urbon kaj landon. Nia kontakt-adreso estas: [vasilkadifeli@gmail.com](mailto:vasilkadifeli@gmail.com)

*La redaktanto ne respondecas pri la subskribitaj aŭ republikigitaj artikoloj.*

## Esperanto-Sumoo



### Mesaĝo pri la jubilea 60-a sumoo

Tre estimata sinjoro Hori!


Septembre de 2009 vi iniciatis interesan kaj originalan kulturklerigan projekton pri legado de libroj en Esperanto, adaptinte ĝin al la reguloj de la nacia japana lukto somoo. Post unu jaro la aktivaĵo jam transiris la limojn de Japanio kaj rapide populariĝis inter legemaj esperantistoj en multaj landoj de la mondo. Post la modesta komenco en 2009 pasis jam dek jaroj, kaj nun danke al via senlaca antaŭenigo de la konkurso, la Esperanto-sumoo havas internacian renomon de la aprezata projekto, kiun volonte partoprenas centoj da esperantistoj. Partoprenantoj de la konkursa legado ne nur legas promesitan nombron de paĝoj sed ankaŭ interkorespondas, verkas recenzojn kaj komentariojn pri ŝatataj libroj, kontribuas por la oficiala sumoo-paĝaro, renkontiĝas kaj konferencas internaciskale. Unuvorte, adeptoj de la Esperanto-sumoo ne nur "kutimiĝas legi librojn kun ĝojo" sed ili ankaŭ unuiĝas neformale en internacia komunumo de esperantistoj-legantoj, praktike pruvas la altan kulturalan valoron de la internacia lingvo Esperanto.

Mi partoprenas la Esperanto-sumoon ekde 2013, kaj dum la pasintaj jaroj ĝi fariĝis konstanta kaj plaĉa ero de mia persona jarkalendaro programo.

Kara sinjoro Hori, mi kore gratulas vin okaze de la jubilea 60a Esperanto-sumoo, deziras al vi kaj viaj alilandaj helpantoj multajn sukcesojn kaj agrablan kunlaboron kun internacia Esperanto- legantaro!

**Vladimir Opletajev** (Vlostano), Surguto, Rusio

## UEA



### N-ro 850 (2020-02-20) 2019: nova rekordo ĉe donacoj por UEA

En 2018 UEA registris grandiozan rezulton pri donacoj (<https://uea.org/gk/799a1>). Kun granda ĝojo la Asocio povas nun diri, ke ĝi denove rekordis! [...]

N-ro 849 (2020-02-17)

### Deklaro de UEA okaze de la Internacia Tago de la Gepatra Lingvo, 21 februaro 2020

[Mesaĝo sendota al UN kaj Unesko en la venontaj tagoj. Kun afabla peto republikigi ĝin en viaj lokaj kaj landaj paperaj gazetoj kaj aperigi ĝin en viaj aliaj komunikiloj. Dankon! [...]

N-ro 848 (2020-02-10)

### Kampanjo por informi pri Esperanto en la junulara festivalo Polandrok 2020

UEA petas vian helpon: Helpu nin kolekti 3 000 € por realigi Esperantan agadon fine de julio [...]

N-ro 847 (2020-02-09)

### UEA alvokas al subteno "Partoprenu UK-on": Montrealo, 2020

Pere de Fondaĵo "Partoprenu UK-on" UEA havas la eblon subteni la aliĝotizon de kelkaj kongresanoj dum la Universala Kongreso en Montrealo [...]

N-ro 846 (2020-02-02)

### La Dua Bulteno por Montrealo 2020 haveblas rete

La Dua Bulteno por la UK en Montrealo (1-a ĝis 8-a de aŭgusto 2020) jam haveblas rete! Tio signifas, ke eblas jam mendi ĉiujn servojn rilate la UK-on: loĝadon, ekskursojn, matenmanĝojn kaj bankedon! [...]

## TEJO



### Malantaŭ la kulisoj de IJK 2019

La organizantoj de IJK 2019 en Slovakio rakontas pri la sperto organizi la Internacian Junularan Kongreson kaj donas valorajn konsilojn pri diversaj fakoj.

Koran dankon al la tuta teamo: via kontribuo helpas al multaj venontaj organizantoj! [...]

### Konkurso "Partoprenu IJK-n" 2020

Jam tradicie la fonduso Partoprenu IJK-n pretas helpi al membroj de TEJO partopreni la Internacian Junularan Kongreson. La IJK 2020 okazos de la 11-a ĝis la 18-a de julio 2020 en Someren, Nederlando.

Dank' al la Fonduso eblas parte kovri vojaĝkostojn laŭ plej malmultekosta maniero (la gajnintoj ricevos ĝis 80% de ĉiuj vojaĝkostoj), la loĝadon en la plej malmultekosta kategorio kaj la programkotizon. [...]

### Malferma alvoko: Iĝu estrarano de TEJO

Laŭ decido de la Komitato de TEJO la 31-an de decembro 2019, TEJO lanĉas malferman alvokon por kompletigi sian estraron.

Kandidato por iĝi estrarano de TEJO devas esti individua membro de TEJO en 2020 kaj esti naskita inter la 1-a de septembro 1984 kaj la 31-a de januaro 2002. Aliaj dezirindaj kvalitoj de kandidato estas sperto en gvidado de volontula organizo, sperto en la (junulara) Esperanto-movado, taŭga lingvonivelo por internacia kunlaboro, laboremo kaj fleksebleco. [...]



## Leteroj de niaj legantoj



Dankon pro la februara donaco: via "internacia" Turka Stelo, el kiu mi plej amas la verkon de Spiros Sarafian. Kiel eldonisto [Fonto] mi sopiras ghin eldoni, se neniu pli kompetenta tion faros.

**Gersi Alfredo Bays** el Brazilo



Karaj, mi preskaŭ ne povis imagi, ke mi nun jam ricevis 50 kajerojn de via interesa kaj ĉiam aktuala gazeto! Nekredeble! El profunda koro mi dankas kaj varme gratulas

okaze de la 50a! Amike,  
**Utho Maier** el Germanio



Saluton, Dankon pro via daŭra kaj elstara laboro kun 'Turka Stelo' kaj pro tio, ke vi daŭre sendas ĝin. Mi ĉiam ĝuas ricevi kaj legi ekzempleron. Kore kaj amike

**Maurizio Rico Giacometto** el Britujo



Elkoran dankon pro la nr 50 de Turka Stelo. Amike

**Bardhyl Selimi** el Albanio

## Krespoj

**K**andelfesto aperis en le jaro 472. Papo GELASA enkondukis ĝin en la kalendaro .

Estas religia, katolika (protestantoj ne festas ĝin, diris al mi amiko Ru Bossong el Neerlandio) festo omaĝe al Jesuo prezentita en la Templo kaj Puriĝo de Sankta Vergulino.

Homoj faris procesion, tenante ĉe la mano kandelegojn benitajn. Tial oni nomis tiun feston: Kandelfesto.

Pilgrimantoj amase eniris la urbon ROMOn. Papo estis devigita disdoni manĝaĵojn. Oni disdonis malpezajn vafojn aŭ platkukojn. Verŝajne ekde tiu momento oni faris krespojn, kiuj estas fakte maldikaj vafoj kuiritaj en pato .

Sed, tiu festo iĝas de antaŭperiodo; jam antaŭe la naskiĝo de Jesuo Kristo okazis festo de la Lumo – pagana festo .

Omaĝe al forpasintaj, ĉiujare familianoj, noktogardis lumigante kandelegojn kaj torĉojn. La paganaj dioj kaj ĉefe Plutono estis honorigitaj.

Poste, multaj legendoj naskiĝis pri feliĉiloj okaze de kandelfesto.

Malnovtempe, oni diris ke benitaj kandelegoj protektis hejmojn, forpuŝis malbonajn spiritojn.

## -- sendis Jocelyne Monneret el Francio


Ĉefe ritoj, celis altiri abundajn rikoltojn.

Nun en Francio la kuiranto prenas moneron en la maldekstra mano samtempe ol tiu saltigas la krespon por ke tiu estu prospera kaj feliĉa dum la tuta jaro venonta .

Krespoj estas la pli amata deserto el 94 procento de geknaboj (laŭ sondado...) ne plu estas religia agado.

sendis **Jocelyne Monneret** el Francio

*Dek manieroj por faldi krespojn en la plato: Kun okanguloj (ok lateroj); laŭ pendemonujo; laŭ korneto, laŭ barketo; laŭfruktopasteĉo; kvarone; en ventumilforma; rulpremita*



5>> nek morfologia transformo same al tiu de Gregor Samsa de Kafka. Ĝi estas ŝanĝo de sorto, kiun okazigis forta bato en la kapo kaj rabado de tiuj buboj.

Laŭ mi la filmo, en kiu ne troviĝas ritmo, konflikto kaj scivolemo same al la filmoj de Holivudo, sin bone spektigas kaj ne ĝenas.

La humuro de Aki Kaurismäki kaj lia tre ŝparemaj dialogoj, la muzikoj kiun li uzas en tre diversaj manieroj, faras lian kinoarton tre originalan.

Tre baldaŭe, en la venonta numero, ni transiros al alia kino-majstro, same al Kaurismäki, kiu ekspozicias la kolorojn de sia lando, de la mondo kaj de sia propra karaktero.



verkis kaj sendis **Konuralp Sunal** el Turkujo 26-a de februaro 2020, Büyükkada, Istanbulo

### VIRO SEN PASINTECO (Mies vailla menneisyyttä)

**D**irektoro Aki Kaurismäki  
Pensema viro. En trajno al Helsinko. Nokte.  
Ni vidas la cigaredon kiun li nenie lasos el sia  
mano dum la tuta filmo.



Elirante la stacidomon li direktas  
sin al la parko. Signo, ke li perdos sian  
identecon : Li rigardas al sia  
brakhorloĝo, kiu jam haltis. Li rigardas  
al la granda murhorloĝo de la  
stacidomo. Baldaŭ la tempo  
ŝangiĝos. Iom poste alproksimiĝas tri  
buboj, kiuj lin faligas per forta bato al  
lia kapo. Ili lin bone batadas. El lia  
terenfalanta valizeto disfalas  
veldmasko. Unu el la buboj prenas lian  
poŝradion kaj ŝaltas ĝin. Elaŭdiĝas  
klasika muziko.

En multaj filmoj de Kaurismäki muziko estas unu  
el la ĉefaj roluloj. La veldmasko estas objekto, kiu tuj  
nuligas la socian statuton de nia heroo. Ni nur  
malkovros, kiu li estas en la fino de la filmo. La buboj  
prenante lian monon kaj forirante, unu el ili metas la  
maskon sur la sanganta vizaĝo de nia heroo. Ĉi tiu  
sceno rememorigis al mi la filmon "Viro kun Fera  
Masko". En la posta sceno, nia heroo kiu zorge  
piediras kun sanganta vizaĝo, falas sur la planko de la  
stacidoma necesejo.

En la sceno en la malsanulejo li estas  
neidentigita kazo, kiun ignoras la kuracisto kaj  
flegistino. La kuracisto forlasante tiun neniun-homon  
diras al la flegistino, ke li transiros al la naskeja parto  
de la malsanulejo. Morto kaj nasko. Ĉi tiu estas la  
ironia komprenemo de Aki Kaurismäki, kiu li esprimas  
tiajn kontraŭstarajon per subtila sento de humoro. La  
elektrokardiografo montras rektan linion. Mi devas  
konfesi al vi, ke same al tiu linio de elektrokardiografo  
la filmoj de Kaurismäki povas esti monotonaj por ni.  
Sed tamen laŭ mi en ili estas multaj ridigaj punktoj.  
Fajne agorditaj ridigaj punktoj sed ne troaj. Same al la  
majstreca penikbato de la pentristo, ironie ridigaj  
tuŝoj. Kaj en tiu filmo estas ĉiam laŭmezure ekvilibra  
sinteno, kiu sentigas al ni la tragedion, humuron kaj  
melodramon.

La drama agado ŝajne ne pluiras en ĉi tiu filmo,  
sed tamen inter la fluo de okazintaĵoj ni perceptas ian  
moviĝon.

La dialogoj estas majstrecaj. La filmoj de  
Kaurismäki ŝajne estas mondo de karikaturo.

Ekzemple lia filmo "Bohemia Vivo" (La Vie  
de Bohème) estas tia. Kvankam la herooj  
ŝajnas esti seriozaj la dialogoj estas  
ridigaj.

S-ro M kiu forgesis sian identecon  
kaj pasintecon estas trovita de bonkora,  
helpema, malriĉa familio sur la rokoj de ŝiphaveno. Tiu  
familio prizorgas lin dum iom da tempo. Poste ili trovas  
kabanon por li. Li devas pagi luon al la avara kaj ruza  
gardisto de la ŝiphaveno. Li konsentas. Por ĉi tiu  
gardisto, kies kondutoj estas minacantaj kaj timigaj,  
ties hundo Hanibalo estas unu el la ridindigaj  
kontraŭstarajaj punktoj en la filmo.



Nia heroo M, simile al ĉiuj aliaj malriĉuloj, kiuj iras  
al la Sava Armeo (angle: Salvation Army) organizaĵo  
por plado de varma manĝaĵo, trovas la amon de sia  
vivo tie. La preferata aktorino de Kaurismäki, Kati  
Outinen, rolas en tiu karaktero. Bonkora sintenema  
knabino, kiu loĝas en unuĉambra ejo kaj kiu tage  
kantas religiajn kantojn, poste pendigas sian  
uniformon kune kun la religia muziko en sia ŝranko kaj  
foriras aŭskulti Rock&Roll muzikon.

Per ŝia helpo M trovas laboron en la deponejo de  
Sava Armeo. Komenciĝas amrilato inter ili. Ĉiuj, tiuj  
homoj estas ordinara malriĉaj homoj. La kamerao kaj  
kompreneble la okulo de la direktoro, tenas nin for de  
la centro de Helsinko. Ĉio, kion ni spektas estas  
malriĉuloj, handikapuloj, flankenlasitaj homoj, kiuj  
nutras sin per manĝaĵoj de socia helpo, kaj dancas en  
tagoj de socia solidareco organizataj por ili.

M, kiu perdis sian socian sekurecan nombron  
nun estas ekster la sistemo. Se li ne memoras sian  
nomon ne estas laboro por li. Ĉar li ne plu havas la  
detalojn per kiuj li subskribos sian laborkontrakton.  
Nur tiu helpema kristana organizaĵo brakumas lin.  
Neniu el ili estas tiom regulemaj. Homo ĉie estas  
homo kaj ĉie troviĝas ia malferma pordo.

Nia heroo finfine malkovras sian nomon, sian  
metion, kaj la lokon de kie li venis. Sed ĝis tiu punkto li  
lernas la amon, amikecon, homaranecon en tiu nova  
ĉirkaŭaĵo. Lia ŝanĝo de identeco estas nek konscia  
elekto same al tiu en la filmo "Vojaĝanto" de Antonioni,

&gt;&gt;4

**E**n la daŭro de mia vivo mult-foje mi pensis pri tio kion diris antaŭ jarmiloj la helena saĝulo Solono (Σόλων). Tiu saĝulo diris, ke ĉar ĉio homa estas nefirma kaj necerta, oni ne povas diri, pri homo ordinara aŭ pri homo distingita, ke li estas feliĉa, oni devas atendi la finon, ĉar estas ja homoj kiuj havis facilan kaj feliĉan vivon, sed tre malfeliĉan, sengloran aŭ hontigan finon; kaj estas aliaj homoj, kiuj havis vivon ordinaran, ne facilan, malriĉan, ne ĉiam feliĉan, tamen ili havis tre bonan finon. Do, laŭ la saĝulo vere feliĉa estis la duaj!



Estas eble ankaŭ aliaj opinioj, tamen mi, longe vaginte en la alloga, tre fora pasinteco, renkontis multajn personojn, mitajn aŭ historiajn, kies la ekzemplo pravigas la saĝulon.

La plej potenca, glora, ĉiopova suvereno de la helena mondo, estis, en sia epoko, Agamemnono (Αγαμέμνων), la reĝo de Argo (Άργος), la fondinto de la plej riĉa kaj brila urbo de ĉiuj epokoj, Miceno (Μυκήναι). Pro tiu lia gloro kaj potenco Agamemnono estis la estro de la helena armeo dum la plej granda tuthelena milito kontraŭ Trojo (Τροία). Estas sciata, ke por efektivi siajn ambiciajn milit-planojn la fiero militestro, laŭ dia postulo, estis devigita buĉferi sian propran filinon Ifigenian kaj tio estas, laŭ multaj opinioj, la plej tragedia momento de tiu aventur-plena, longa dramo. Mi ne parolos ĉi-tie detale pri tiu, tiom malagrabla okazaĵo, mi nur diros, ke tiu horora sanktofero ne estis plenumita; la lastan momenton, kiam la virgulino estis sur la altaro, kiam la pastro levis la ponardon kaj ĉiuj ĉeestantoj en komuna, muta lamentado, kovris la okulojn, densa nigra nubo kovris ĉion, kaj kiam ĝi maldensiĝis la junulino estis malaperinta, sur la altaro estis ĵusbuĉita blanka cervo.

Tio ĉi estis la unua akto de mia rakontado; en la dua la granda milito estis antaŭ longe eksplodita, Agamemnono kun sia eksternorme granda armeo

estis sur la malamika troja lando kaj sieĝadis la potencon metropolon de la troja reĝo Priamo (Πρίαμος). Tiu sieĝado, do la tuta milito, daŭris longe kaj la kruelaj bataloj estis tre oftaj. Sub la estreco de la plej granda heroo de la helena flanko, de la renoma Aĥilo (Αχιλλεύς), nemultenombraj taĉmentoj da elektitaj batalantoj ofte invadis najbarajn al Trojlando regionojn, por akiri la necesajn provizojn por la granda armeo. En unu tia sturmo de Aĥilo en civito nomata Tebo (Θήβαι), loĝata de Cilicianoj, inter la kaptitaĵoj, inter la sklavigitaj virinoj estis Kriizeisa, tre signifa persono. Tiu juna virino estis tre signifa ne nur ĉar ŝi estis nobla kaj tre bela, sed ĉar ŝi estis la solfilino de Krizo (Χρύσης), kaj tiu Krizo estis reĝo de la samnoma insulo, sur kiu estis la plej brila en la tuta Azio sanktejo, dediĉita al la dio Apolono (Απόλλων). Krizo estis ne nur tre riĉa reĝo, sed la plej malnova, pia kaj fidela pastro, en la apolona sanktejo de sia insulo. Lia filino, Kriizeisa, farante viziton al parencoj, hazarde troviĝis en Tebo, la tagon, kiam la helena taĉmento atakis la urbon, kaj tiale ŝi estis kaptita, kun aliaj virinoj. La malfeliĉa virino, taksita de la forrabintoj valora akiraĵo, estis donace donita al la supera estro, al Agamemnono. Kiam Krizo informiĝis pri la malfeliĉo kiu batis sian amatan filinon, tuj amasis abundan trezoron kaj rapide ŝipiris al Trojo. Li atingis la kampadejon de la Helenoj kaj sin prezentis al la supera konsilio de la militestroj. Por montri sian noblan devenon kaj rangon kaj por emfazi sian hieratikan altoficon, li portis brilan ornamitan kostumon kaj li tenis la imponan oran sceptron de la ĉefpastro. Li petis pri la liberigo de sia filino kaj li oferis, kiel elaĉetaĵon multekostan trezoron. La plimulto de la helenaj suverenoj estis impresitaj de la grandiozo de Krizo kaj ties oferaĵoj, tamen, la aroganta estro, Agamemnono, kondukante kontraŭ la pastro kvazaŭ kontraŭ mizera servisto, forpelis lin malafable kaj humilige. La respektinda viro foriris kaj falinte en profundan malesperon li sin turnis al sia patrono, Apolono, li varme preĝis kaj petis de li la punon de la ofendinto. Ŝajnas ke Apolono montris sian favoron al sia fidela servanto. La duan tagon post la foriro de Krizo, neeksplikebla malfeliĉo trafis la tutan helenan armeon; dekoj da homoj kaj centoj da brutoj, kvazaŭ trafite de nekonata, tre drasta malsano, mortis ĉiutage. Neniu kuracisto povis doni eksplikon al la eksterordinara subita fenomeno, ĉio montris ke la armeo estas minacata de certa pereco. Kiam la armeestroj konsciis tion, tuj alvokis Kalĥason





(Κάλχας), la ĉefpastron de la helena flanko kaj plej bonan diveniston de la tuta mondo. Kalfaso ne bezonis longan tempon, por kompreni kaj ekspliki, ke la kolero de Apolono, kies favorato estis severe ofendita, kaŭzas la neeksplikeblan malfeliĉon kaj kondukas la helenan armeon rekte al certa neniiĝo. Li konsilis la militestrojn mildigi la indignon de la dio per serio da ceremonioj kaj sanktoferoj, sed, precipe, tuj liberigi Krizeisan kaj konduki ŝin al ŝia patrujo, ĉe ŝia ofendita patro. Agamemnono obeis; li koleris, tamen obeis, kaj unu el la plej grandaj estroj de la militistaro, Odiseo (Οδυσσεύς), la reĝo de Itako (Ιθάκη), prenis sur sin la taskon konduki Krizeisan kaj liveri ŝin al ŝia patro, al kiu estis krome oferitaj riĉaj donacoj.

Ĉio tio ĉi estis la dua akto de tiu ĉi mia rakontado. Por iri al la tria, mi devas unue diri, ke la troja milito post dek plenaj jaroj finiĝis, la granda reĝo, Agamemnono, glorega venkinto, en sia tuta majesteco revenis al sia patrujo, sed tie li renkontis la plej humiligan, negloran morton. Lia malfidela edzino Klitemnestra (Κλυταιμνήστρα) kaj ties amoranto murdis lin kruele, kaj en tiu ĉi punkto mi ankoraŭfoje memoras la saĝulon Solono, pri kiu mi jam parolis.

Do, en la tria akto de la rakontado prezentiĝas Oresto, la sola filo de la murdita Agamemnono. Tiu Oresto estis malgranda infano kiam lia patro foriris al la granda milito kaj li estis sendita de sia patrino malproksimen, al Focido (Φωκίς), ĉe la reĝo de tiu lando Strofio (Στρόφιος). Kiam la informo pri la morto de Agamemnono disvastiĝis kaj atingis Focidon, Oresto estis jam juna viro, li estis la laŭleĝa sola heredanto de la trono de la potenca Argo, tamen senkiale li estis ekzilita de la murdintoj de lia patro. Kompreneble, li devis depostuli sian rajton kaj pro tio li vizitis la divenejon de Delfoj (Δελφοί) kaj petis pri orakolkonsilo. La dio, Apolono, tute klare instigis lin venĝi al la murdintoj de sia patro kaj Oresto, akompanate de sia intima amiko Pilado (Πυλάδης), filo de la reĝo Strofio, iris rekte al Miceno. Tie li estis rekonita nur de sia fratino Elektra (Ηλέκτρα), sed la tuta historio rilate al tiu fratino kaj la rekono de Oresto

povas esti temo de alia, tre interesa rakontado. Ĉi tie interesas nin nur tio, ke Oresto faris la venĝon mortiginte sian patrinon kaj ties amoranton kaj uzurpanton de la trono. Li venĝis sian patron, tamen lia krimo estis tre peza. Patrinmortigo estas la plej grava, nepardonebla krimo. En la okazo de Oresto, tiu krimego estis aprobita, eĉ indikita de la dio Apolono, tamen tio ne trankviligis la Eriniojn (Ερινύαι), kaj tiuj Erinioj estis diinoj-punantoj, personigo de la rimorso, naskata de grave kulpa konscienco. Oresto, persekutate de la senindulgaj Erinioj, longe vagadis sencele, li suferadis, li povis trovi nenian trankvilon, ripozon, dormon, li estis ĉe la sojlo de frenezo, kiam li rifuĝis ankoraŭfoje en Delfoj, en la sanktejo-divenejo de Apolono, por petegi pri sia purigo kaj savo. Laŭ nova konsilo de la divenejo, do, de Apolono, la turmentita viro iris rekte al Ateno (Αθήνα), por peti pri la protekto de la diino Atena (Αθηνά). Tie, en la glora urbo de la brila diino, nia heroo estis submetita al la juĝo de Areopago (Αρειος Πάγος), la supera tribunalo de la tuta Helenujo, funkcia sub la aŭspicio de Atena mem. Estis proceso malfacila, en kiu regis du, kontraŭaj inter si argumentoj. Laŭ la unua, estas la viro, tiu kiu generas la infanon, dum la virino estas io simila al la inerta tero, kiu nur akceptas kaj entenas la semon ĝis la naskiĝmomento, nu, Oresto nepre devis venĝi sian patron, sian solan estiginton, mortigante ties murdintojn, kiuj ajn ili estis. Laŭ la dua opinio, estas la patrino tiu kiu donas sian sangon al la infano, kiu longe enportas kaj nutras ĝin, kiu naskas ĝin terure suferante kaj ofte perdante sian vivon, do, la krimo de Oresto, la mortigo de la estaĵo kiu donis al li sian propran sangon estas tute nepardonebla. La proceso estis plenumita, sed la juĝoj, kulpigaj kaj senkulpigaj estis egalnombraj kaj nur la voĉdono de Atena, de la ĉefjuĝisto, pezis sur la absolvintan verdikton. Oresto estis senkulpa, tamen la Erinioj ne kontentiĝis, ili persistis, ili depostulis sian rajton kiel eble plej severe puni la krimulon. La definitivon solvon donis Apolono, kiu komisiis al Oresto la tre danĝeran mision, iri al la malproksima Skitio (Σκυθία) al Taŭrido (Ταυρίς), la nuntempa Krimeo (Κριμαία) kaj tiama patrujo de la sovaĝa popolo de la Taŭroj, por ŝteli kaj alporti al Atiko (Αττική), la plej antikvan, lignan idolon de la diino Artemisa (Αρτεμις), kiu, laŭ la tradicio, estis falinta de la ĉielo.

Kaj jen, ĉi-tie komenciĝas la kvara akto de la rakontado, la akto kiu kunligas la komencon kun la fino. Oresto, ĉiam akompanate de sia kunulo Pilado, post longa, aventura vojaĝo atingis Taŭridon kaj ili provis la neblaĵon eniĝi en ĝin kaŝe. Ili devis fari tion, ĉar, laŭ sia moro la barbaraj Taŭroj arestis kaj mortigis,



buĉoferis al la diino Artemisa, ĉiun fremdulon, kiu aŭdacis atingi ilian teritorion. La lando estis tre bone gardata, tiel la du junuloj estis kaptitaj kaj kondukataj al la terura, sovaĝa reĝo Toono (Θόων), kiu, kompreneble, ordonis ties ekzekuton. Laŭ la kruela kutimo, antaŭ la buĉofero, la viktimoj estis kondukataj al la templo de la diino, kie, la devige, eĉ dumvive komisiita sola pastrino, tute sola faris specialan, sekretan ceremonion, por tute purigi kaj senpekigi ilin. Kaj, jen la surprizo, pastrino ĉe la sanktejo de Artemisa en Taŭrido, estis Ifigenia! Jes, estis tiu sama Ifigenia, la filino de Agamemnono, kiu estis sanktoferita de sia propra patro en Aŭlido (Αυλίδς). Ĉiuj, kompreneble, memoras, ke kiam la malfeliĉa junulino estis metita sur la oferaltaro, mirakle ekmalaperis. Ŝi malaperis, ĉar la diino mem forprenis kaj kondukis ŝin malproksimen, al Taŭrido, kie ŝi iĝis pastrino de la tiea granda sanktejo. Kiam, do, Ifigenia akceptis la du junulojn, kaj kiam ŝi aŭdis, ke ili parolas la helenan, ŝi komprenis, ke la kondamnitaj estas Helenoj, do, ŝi komencis demandi ilin, avide dezirante ekscii ĉion ajn pri Helenujo kaj speciale pri sia propra patrujo kaj familio. Sekvis multo, sekvis longa, tre emocia, vere korŝira intertraktado, tamen ankaŭ tio ĉi povus esti afero de aparta rakontado. Ĉi tie mi diru nur, ke Ifigenia rekonis sian tre junan fraton, Oresto ekmemoris sian perditan pli aĝan fratinojn, kaj ĉio sekvis sian vojon. Ifigenia sendis mesaĝon al Toono kaj sciigis al li, ke la arestitoj estas kulpaj pri teruraj, ekstremaj krimoj, pro tio ili havas danĝeran, infektan efikon sur ĉiu homo kiun ili kontaktas aŭ al kiu ili alproksimiĝas, do, ilia purigo postulas specialan, sekretan riton, kiu devas okazi en la libera naturo, ĉe la marbordo. La timo de la infektado tenis ĉiujn tre malproksime kaj tiel la afero de la eskapo estis facila por la tri intrigantoj, kiuj, preninte kun si la idolon de la diino, kaj ŝtelinte boaton, foriris de Taŭrido nokte.

Estas kompreneble, ke la kruela Toono, post nur kelkaj horoj, komprenis la konspiron kaj tuj ordonis, ke oni pretigu la plej rapidan ŝipon. La eskapintoj trapasis Helesponton (Ελλησποντος), kaj, sciante ke iliaj persekutantoj estas proksime, preferis interrompi sian navigadon kaj alboridiĝi al la unua insulo, kiun ili renkontis. Kaj ĉar estas ja ĝusta la diraĵo, ke la tempo faras ciklojn, tiu insulo estis la lando de tiu, severe ofendita, reĝo-pastro, de Krizo. Mi memorigas, ke, fine, la forkaptita de la Helenoj filino de Krizo estis elliberigita, sed mi aldonu, ke kiam ŝi revenis al sia patrujo ŝi estis graveda. Al sia fiera, tiom suferinta patro ŝi diris ke neniu viro tuŝis ŝin, sed pri ŝia stato responda estas la dio Apolono, kiu tiamaniere montris sian favoron al sia fidela pastro. Tiam, do, estis naskita la filo de Krizeisa, kiu ricevis la nomon de sia avo kaj kiu estis la princo kaj, junulo jam, la vera reganto de sia lando. Kiam la tri eskapintoj estis kondukataj al la reĝa konsilio, sciante nenion pri la pasintaj okazaĵoj, fiere sciigis, ke ili estas membroj de la granda helena reĝa domo de Argo, la gefiloj de la potenca kaj glora Agamemnono, kiuj petas pri la protekto de la loka reĝo. Kiam la maljuna reĝo aŭdis tion, kiam li komprenis, ke antaŭ li staras idoj de sia plej granda malamiko, de la viro, kiu tiom humilige estis lin ofendinta, en konsento kun sia nepo, ordonis ilian areston kaj enkarcerigon. Kaj kiam la ŝipo de la Taŭroj atingis la landon kaj la kruela Toono petis pri la livero de la arestitoj, Krizo akceptis la peton kaj ĉio estis preta por la livero de la katenigitaj, kiam - jen nova granda surprizo - Krizeisa sin prezentis antaŭ sia patro kaj sia filo kaj plorante malkaŝis sian, tiom longe konservitan, grandan sekreton. La juna princo, la juna Krizo ne estas filo de Apolono, sed filo de sia perfortinto, de Agamemnono, do, Ifigenia kaj Oresto ne estas malamikoj de ŝia familio, ili estas gefratoj de ŝia filo! La malkovro de tiu veraĵo, kompreneble, renversis ĉion, la arestitoj estis elliberigitaj kaj ĉar Toono reagis nedece kaj perforte, Oresto mem kontraŭstaris kaj mortigis lin.

Kaj ĉar, kompreneble, ĉiuj deziras scii la finon de nia historio, mi aldonu, ke niaj herooj revenis al Helenujo, Oresto, liberigite de la Erinioj, akiris la gloran sceptron kaj tronon de sia patro, Ifigenia ricevis sian lokon en la palaco, Pilado edziĝis kun la juna princino Elektra, do, ĉio glate iris. La idolo de Artemisa estis metita kun eksterordinaraj honoroj en la granda sanktejo de la diino, en distrikto de Ateno nomata Braŭrono (Βραυρών), kie ĝis nun staras, vere vidindaj, restaĵoj de la brila templo, vizitata de multaj lokaj kaj fremdaj turistoj, malmultaj el kiuj scias tiun ĉi belan historion!



## Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj (parto 2)


(daŭrigata)

kaj devoj kaj de kiu ajn kriminala akuzo kontraŭ li.



### Artikolo 5

Neniu suferu torturon aŭ kruelan, nehuman aŭ sendignigan traktadon aŭ punon.



### Artikolo 6

Ĉiu rajtas esti ĉie agnoskita jure kiel persono.



### Artikolo 7

Ĉiuj homoj estas jure egalaj, kaj rajtas sen diskriminacio al egala jura protekto. Ĉiuj rajtas ricevi egalan protekton kontraŭ kia ajn diskriminacio, kiu kontraŭas tiun

ĉi Deklaracion, kaj kontraŭ kia ajn instigo al tia diskriminacio.



### Artikolo 8

Ĉiu rajtas ricevi de la kompetentaj naciaj tribunaloj efikan riparon pro agoj, kiuj kontraŭas la fundamentajn rajtojn, kiujn li havas laŭ la konstitucio aŭ

la leĝoj.



### Artikolo 9

Neniu suferu arbitrajn areston, malliberigon aŭ ekzilon.



### Artikolo 10

Ĉiu en plena egaleco rajtas je justa kaj publika proceso antaŭ sendependa kaj senpartia tribunalo, por prijuĝo de liaj rajtoj



### Artikolo 11

1. Ĉiu akuzita pro punebla faro rajtas, ke oni supozu lin senkulpa, ĝis oni pruvos laŭleĝe lian kulpon en publika proceso, en kiu li ricevis ĉiujn garantiojn necesajn por sia defendo.

2. Neniu estu konsiderata krimkulpa pro kia ajn ago aŭ neago, kiu ne konsistigis puneblan faron, laŭ nacia aŭ internacia juro, en la tempo, kiam ĝi estis farita. Same tiel, ne estu aljuĝita pli severa puno ol tiu, kiu estis aplikebla en la tempo, kiam la punebla faro estis plenumita.



### Artikolo 12

Neniu suferu arbitrajn intervenojn en sian privatecon, familion, hejmon aŭ korespondadon, nek atakojn

kontraŭ sia honoro aŭ reputacio. Ĉiu rajtas ricevi juran protekton kontraŭ tiaj intervenoj aŭ atakoj.



### Artikolo 13

1. Ĉiu havas la rajton libere moviĝi kaj loĝi interne de la limoj de kiu ajn ŝtato.

2. Ĉiu rajtas eliri el kiu ajn lando, inkluzive la propran, kaj reveni en sian landon.




### Artikolo 14

1. Ĉiu rajtas peti kaj ricevi en aliaj landoj azilon kontraŭ persekuto.

2. Tiu rajto ne estas alvokebla en kazoj de persekutaj akuzoj malfalse levitaj pro ne-politikaj krimoj aŭ pro agoj kontraŭaj al la celoj kaj principoj de Unuiĝintaj Nacioj.

(daŭrigota)

## Ŝercoj



- Najbaro, mi proponas al vi, starigu birdotimigilon en via ĝardeno por ke la birdoj ne ŝtelu la semojn!

- Ne necese. Mia bopatrino estas en la ĝardeno dum la tuta tago.

\*\*\*

- Kio estas la diferenco inter tranĉilo kaj la lango de la bopatrino?

-?

- Post iom da tempo la tranĉilo foruziĝas.

\*\*\*

Jaĉjo revenas hejmen kun sako plena da pomoj. kaj panjo demandas:

- Jaĉjo, de kie vi havas tiom da pomoj?

- De najbaro.

- Kaj ĉu li scias pri tio?

- Evidente, ja li eĉ postkuris min!

\*\*\*

Du embrioj interparolas:

— Kiel vi pensas, ĉu estas vivo post la nasko?

— Mi ne scias: de tie ankoraŭ neniu revenis.




## Krucvortenigmo

### HORIZONTALAJ DIFINOJ ( → )

1. Ruĝe flavaj; 6. Pasinta doloro for el \_\_\_ (Zamenhof); 7. Sufikso esprimanta plej altan gradon de grandeco; 8. Kontraŭo de plor-; 9. Diri "ne"; 11. Pasinta doloro for \_\_\_ memoro; 12. Pasinta \_\_\_ for el memoro; 14. Unuaĵo.

### VERTIKALAJ DIFINOJ ( ↓ )

1. Muzikstilon de Bob Marley; 2. Sufikso montranta vorton kiu rilatas al la ĉefvorto; 3. Pasinta doloro \_\_\_ el memoro; 4. La malantaŭa parto de armeo; 5. Tirolkanto; 6. Rezervu! Ordu!; 10. Ni, vi, \_\_\_ ; 13. Sufikso esprimanta pasivon.



Sufikso esprimanta pasivon.

Fonto:  
Semajno de  
Enigmaj #5

<http://www.semajnodeenigmaj.com>


(La solvo de la krucvortenigmo troviĝas en la antaŭlasta paĝo)

## Vesto

Korp' estas vesto vivanta, kiun oni denaske gajnas. Jen ĉiutaga miraklo – poezie pri ĝi mi zorgas: pano, kiu nutras revon, kaj igas tolerebla tagon.

En ĉi tiu punkt' de' l vivo, fiere kaj ĝoje mi diras, ke mi kapablas ankoraŭ mian korpon promeniĝi,

Dum horoj plenaj de lumo, ĉu en urb' aŭ en kampar', mi deziras, ke ĝi trinku la tutan misteron bluan de ĉi matenoj aŭtunaj.



Juiz de Fora, 27/04/2018

fonto: <http://verkoj.com/verkistoj/maria-nazare-laroca/vesto/>



verkis Maria Nazaré Laroca el Brazilio

**LA AŬTUNAJ MUŜOJ (1931)**  
(daŭrigata)

Ŝi trovis nenion, febre serĉpalpis, forgesante kion ŝi volas, senpacience reĵetis la okulvitrujon, la komencitan trikaĵon, la portreton de infanaĝa Jurij...

Ŝajnis al ŝi, ke oni atendis ŝin? Stranga febroy flamigis ŝian sangon.

Ŝi malfermis ŝrankon, lasis ĝin kun ties batanta pordo kaj malfermita tirkesto.

Falis vestohoko.

Ŝi iomete hezitis, levis la ŝultrojn, kvazaŭ ŝi ne havus tempon por perdi kaj subite eliris. Ŝi trairis la apartamenton, malsupreniris la ŝtuparon per siaj rapidaj kaj silentaj paŝetoj.

Ekstere ŝi haltis. La frosta nebulo plenigis la korton kiel fumo. Gutetoj pikis ŝian vizaĝon, kvazaŭ pintoj de neĝpingloj, kiam tiuj falas duonfanditaj kaj ankoraŭ miksitaj kun la septembra pluvo.

Malantaŭ ŝi, eliris du viroj en frakoj kaj strange rigardis ŝin.

Ŝi sekvis ilin, enŝoviĝis en la malfermeton de la pordo, kiun iu refermis malantaŭ ŝia dorso kun obtuza ĝemo.

Ŝi estis sur strato malluma kaj senhoma; lumigita stratlampeo brilis tra la pluvo.

La nebulo disiĝis... la pavimo kaj la muroj malforte brilis...

Iu viro preterpasis, trenante siajn malsekajn ŝuplandumojn, kiuj elŝprucigis akvon.

Hundo trairis la straton iom haste, proksimiĝis al la maljunulino, flaresploris ŝin, sekvis ŝiajn paŝojn kun grumbleto ĝema kaj malkvieta.

Ĝi sekvis ŝin kelkan tempon kaj lasis ŝin.

Ŝi plu iris, ekvidis placon, aliajn stratojn.

Taksio tuŝetis ŝin tiel proksime, ke ĝi ŝprucmakulis ŝian vizaĝon de koto.

Ŝi ŝajne vidis nenion. Antaŭen ŝi pluiris, ŝanceliĝante sur la malsekaj pavimeroj.

De tempo al tempo, ŝi sentis sin tiel laca, ke ŝiaj kruroj ŝajnis al ŝi fleksiĝi sub ŝia korpopezo. kaj enprofundiĝi en la grundon.

Ŝi levis la kapon, rigardis la taglumon, direkte al la

rivero Sejno, pecon de blanka ĉielo ĉe la fino de la strato.

En ŝiaj okuloj, tio fariĝis neĝkovrita ebenaĵo, kiel tiu de Suĥarevo.



Ŝi pli rapidis, blindigita de pluvo kvazaŭ fajro, kiu tranĉas ŝiajn palpebrojn. En ŝiaj oreloj aŭdiĝis bruo de sonoriloj.

Ekfulmo de prudento revenis al ŝi dum momento. Ŝi klare vidis la nebulon kaj fumon disiĝi ... sed tio ĉesis : malkvieta, laca kaj sin klinanta al la grundo, ŝi ree paŝis kaj fine alvenis al la kajoj.

La Sejno estis alta kaj ties akvo kovris la bordorandon.

Tagiĝis kaj la horizonto blankiĝis kun pura kaj luma brilo.

La maljunulino proksimiĝis al la parapeto, fikse rigardis tiun flagrantan ĉielostrion.

Sub ŝiaj piedoj eta ŝtuparo estis kavigita en la ŝtono.

Ŝi ekprenis la manrelon, forte premis ĝin per sia malvarma kaj tremanta mano, kaj ekis malsupreniri.

Sur la lastaj ŝtupoj fluis akvo. Ŝi ne vidis ĝin.

"La rivero frostiĝis" ŝi pensis, "ĝi certe estas frostita en tiu sezono..."

Ŝajnis al ŝi, ke necesas nur trairi ĝin kaj ĉe la alia flanko troviĝas Karinovka. Ŝi vidis la lumojn de la terasoj flagri tra la neĝo.

Sed kiam ŝi alvenis malsupren, fine mirigis ŝin laodoro de l' akvo.

Ŝi havis abruptan movon de konsterno kaj kolero, iomete haltis, tamen plu malsupreniris malgraŭ la akvo, kiu trairis ŝiajn ŝuojn kaj pezis ŝian jupon.

Nur ĝuste kiam ŝi estis mezkorpe enirinta en la Sejnnon, ŝi tute rekonsciĝis. Ŝi sentis sin malvarmega, volis krii, sed havis nur la tempon por sin krucsigni, antaŭ ol refalis la levita brako.

Ŝi estis mortinta...

La eta kadavro flosis kelkan tempon, kvazaŭ pako de ĉifonoj, antaŭ ol malaperi, kaptita de la malhela Sejno.

**(FINO)**


tradukis MIKELO (Michel Dereyger), el Francio

**K**araj, mi havas grandan ideon por reklami Esperanton:

Ni devas forrabi Dwayne Johnson. Mi scias kie li loĝas. La novaĵo fulmrapide disvastiĝos tra la mondo, kaj kiam oni demandas: "kiu forrabis lin?", la respondo estos: "la esperantistoj !" Sekve oni scivolemos pri nia lingvo, oni demandas: "kio estas Esperanto?" kaj tiel pli kaj pli homoj ekkonos kaj eklernos ĝin!

Nu, bone, mi povas imagi ke eble Dwayne iom rezistos kaj klopodos por kontraŭstari la forrabon


ĵetante pugnobatojn dekstren kaj maldekstren. Tial mi pensas, ke por ostaĝigi lin necesos, ke almenaŭ 30 el ni kunlaboru tiutage.. Eble 40: po dudek maltimuloj por ĉiu lia brako, kaj dum vi senmovigos lin mi batos lian kapon per kuirpoto.



## Blogo de ordemulo

-- el la blaga blogo

**L**aŭ miaj spertoj, oni povas dividi la homaron en du grupojn. La unuan konsistigas tiuj homoj, kiuj neniam forgesas remeti fermilojn de objektoj



(botelo, dentopastujo ktp) al la koncerna loko, kaj la duan la neglektemuloj, kiuj povas trankvile pluvivi ĉirkaŭataj de

malfermitaj ujoj kaj iloj. Malbonŝance, mi apartenas al la unua grupo, do al tiuj personoj, kiuj suferas vidante orfecan skribilingon aŭ botelon perdintan la rilaton kun sia propra korko, eble por ĉiam. Same, min suferigas malfermitaj zipoj, tirkestoj kaj ŝrankoj. Ĉu vi rimarkis, kiel facile estas por ŝtelisto pluki valoraĵojn el via malfermita sako? Aldone, por kio utilas senkorka botelo? Ĉu neniam malfermita tirkesto vundis vian kruron aŭ genuon?


Oni laŭdas min kiel tre ordeman homon, sed mi rimarkas, ke tiuj malobservemuloj, kiuj perdas ie ŝtopilojn, havas multe pli feliĉan kaj senstreĉan vivon ol mi mem. Mi rajtas diri tion, ĉar la destino fatale disponigis al mi mirindan edzinon, kiu –ho ve! – apartenas al tiu feliĉe trankvila parto de la homaro. Miaj gefiloj, bonŝance, pli profitis la patrinajn genojn, do ili estas belaj kaj sanaj sed, tamen, ankaŭ ili estas adeptoj de tiu senzorgema kaj kompreneble, neorganizita – eĉ neorganizibla – grupo.

Tial mi pasigas la tagon inter malfermitaj tirkestoj kaj ŝrankoj, klopodante reparigi skribilojn kaj ujojn kun iliaj fermiloj kaj vidante, ke nur mi zorgas pri tiuj vere gravaj aferoj.

Foje mi pensas, ke se mi loĝus sola, mia hejmo estus kvazaŭ paradizo: ĉio troviĝus ĉiam en sia taŭga loko. Kiel en muzeo, sed sen etiketoj – mi ja ne estas tiom freneza.

Tamen, mi pensas, ke eĉ en tiu vere ideala situacio mi ne estus feliĉa, ĉar sola, mi certe havus pli da ordo kaj tempo, sed mi timas, ke mi sentus min kiel

perditan korkŝtopilon serĉantan sian botelon (atentu kara leganto, ne mistrafu la metaforon: la botelo estas mia edzino), kiu certe senzorge vivus sian senprobleman vivon ie ajn, sen spuro de sopiro al sia korko (do, al mi mem, por fini la rakonton tirante la fadenon de la antaŭa metaforo).



verkis **Viktoro SOLÉ** el Katalunio

Fonto: "La blaga blogo", revuo **Kontakto**, #274, 2016:4, p.8

## Poemoj de Elena Popova

### P O M O

Mi ne kreskas en la ter',  
kiel la terpomo,  
sed laŭ mia nomo,  
mi estas vera pomo.  
Kiu manĝas pomon,  
estos sana homo.



### T E O

Ĉu sorĉan teon  
trinkis, aŭ ruĝan vinon,  
la Jar' varmega?



verkis kaj sendis **Elena Popova** el Bulgario  
bildoj de **Hori Jasuo** el Japanio

**Franco KAFKO (Franz Kafka) \***  
**La transformiĝo (parto 2)**  
**(daŭrigata)**



Li provis pro tio, unue ellitigi la supran parton de la korpo, kaj turnis gardeme la kapon al la litrando. Tio sukcesis ja facile, kaj malgraŭ siaj larĝo kaj pezo sekvis fine la korpomaso malrapide la turniĝon de la kapo. Sed kiam li fine tenis la kapon ekstere de la lito en la libera

aero, li ektimis, plu tiel antaŭeniĝi, ĉar se li fine sin tiel lasus fali, devus vere okazi miraklo por ke la kapo ne estu lezota. Kaj la konscion li devis ĝuste nun neniupreze perdi; prefere li volus resti enlite.

Sed kiam li, post sama penado ekĝemante, tiel same kuŝis kiel antaŭe kaj ree vidis siajn gambetojn eble ankoraŭ pli krude interluktantaj kaj ne trovis eblon por kvietigi kaj ordigi tiun arbitraĵon, li ree diris al si, ke li absolute ne povas resti enlite kaj ke estas plej prudente ĉion oferi, se nur estas la plej et espero, sin per tio liberigi de la lito. Dume li tamen ne forgesis intertempe al si memorigi, ke multe pli ol malesperaj decidoj valoras trankvila kaj plej trankvila pripensado. Dum tiaj momentoj li plej eble fikse direktis la okulojn al la fenestro, sed bedaŭrinde el la apsekto de la matenebulo, kiu vualis eĉ la alian flankon de la mallarĝa strato, ne eblis preni multe da optimismo kaj gajeco. “Jam la sepa”, li diris al si ĉe rea sono de la vekilo, “jam la sepa kaj ankoraŭ tioma nebulo.” Kaj momenteton li kuŝis trankvile kun malforta spiro, kvazaŭ li atendus eble de la kompleta silento la revenon de la realaj kaj memkompreneblaj kondiĉoj.

Poste tamen li diris al si: “Antaŭ ol sonos la sepa kaj kvarono, mi nepre devas esti komplete ellitiĝinta. Cetere ĝis tiam ja ankaŭ venos iu de la magazeno, por demandi pri mi, ĉar la magazeno estas malfermata antaŭ la sepa.” Kaj nun li komencis elbalanci la korpon laŭ ĝia tuta longo tute sammove el la lito. Se li lasos sin tiumaniere fali el la lito, la kapo, kiun li volis ĉe la falo forte levi, antaŭvideble restos nelezita. La dorso ŝajnis malmola; al tiu ĉe la falo sur la tapiŝon certe nenio okazos. La plej grandan zorgon kaŭzis al li la konsidero pri la laŭta bruo, kiu estiĝos kaj kiu verŝajne malantaŭ ĉiuj pordoj naskos se ne

timon, tamen maltrankviliĝojn. Sed tio devis esti riskata.

Kiam Gregoro jam duone ŝvebis ekster la lito - la nova metodo estis pli ludo ol streĉado, li bezonis nur puŝmove sin balanci -, li ekpensis, kiom simpla ĉio estus, se oni venus lin helpi. Du fortikuloj - li pensis pri sia patro kaj la servistino - estus tute sufiĉaj; ili devus nur ŝovi siajn brakojn sub lian volbitan dorson, tiel lin elŝeli el la lito, sin terenflexi kun la ŝarĝo kaj tiam nur prudente toleri, ke li efektivigu la transsvingon sur la planko, kie tiam la gambetoj espereble ekhavas sencon. Nu, tute nekalkulite, ke la pordoj estis ŝlositaj, ĉu li vere voku pri helpo? Malgraŭ la tuta embaraso li ne povis ĉe tiu penso subpremi rideton.

Jam li estis tiom ekstere, ke ĉe iom forta balanco li gardis apenaŭ la ekvilibron, kaj tre baldaŭ li devis nun definitive decidi, ĉar post kvin minutoj estos la sepa kaj kvarono, kiam oni sonis ĉe la loĝeja pordo. “Tio estas iu el la magazeno”, diris li al si kaj preskaŭ rigidiĝis, dum liaj gambetoj dancis des pli urĝe. Dum momento ĉio restis silenta. “Ili ne malfermas”, diris al si Gregoro, kaptita de iu sensenca espero. Sed tiam iris kompreneble kiel ĉiam la servistino firmpaŝe al la pordo kaj malfermis. Gregoro bezonis nur aŭdi la unuan salutvorton de la vizitanto kaj jam sciis, kiu estis - la prokuristo mem. Kial Gregoro do estis kondamnita servi ĉe firmao, kie oni ĉe la plej eta manko jam ekhavas la plej egan suspekton? Ĉu ĉiuj dungitoj senescepte do estis fiuloj, ĉu inter ili vere ekzistis neniu fidele sindona homo, kiu, se li eĉ nur kelkajn matenajn horojn ne estis uzinta por la entrepreno, pro konscienciproĉoj freneziĝis kaj ne estis kapabla forlasi la liton? Ĉu vere ne sufiĉis pridemandigi lernoknabon - se entute tiu demandado estis necesa -, ĉu devis veni la prokuristo mem kaj devis demonstri per tio al la tuta senkulpa familio, ke la priserĉado de tiu suspekta afero povis esti konfidata nur al la intelekto de prokuristo? Kaj pli kiel sekvo de la agaco, kiun provokis en Gregoro tiuj pensoj, ol sekve de vera decido, li svingis sin per tuta forto el la lito. Estiĝis laŭta bato, sed vera bruo tio ne estis. Iomete la falo estis malfortigita de la tapiŝo, ankaŭ estis la dorso pli elasta, ol Gregoro pensintis, de tio venis la ne tiom atentoveka obtuza sono. Nur la kapon li estis ne sufiĉe prudente teninta kaj ĝin surpuŝinta; li turnis ĝin kaj frotis ĝin al la tapiŝo pro kolero kaj doloro.

“Ene io falis”, diris la prokuristo en la apuda ĉambro maldekstra. Gregoro provis imagi, ĉu ne ankaŭ al la prokuristo foje povus okazi io simila, kia



hodiaŭ al li; ties eblecon oni devus ja vere koncedi. Sed kvazaŭ kiel kruda respondo al tiu demando la prokuristo en la apuda ĉambro nun faris kelkajn decidajn paŝojn kaj knarigis siajn lakledajn botojn. El la apuda ĉambro dekstra flustris la fratino, por informi Gregoron: "Gregoro, la prokuristo estas ĉi tie". "Mi scias", diris Gregoro antaŭ sin; sed tiom laŭte, ke la fratino ĝin povu aŭdi, li ne kuraĝis fortigi la voĉon.

"Gregoro", diris nun la patro el la apuda ĉambro maldekstra, "la sinjoro prokuristo venis kaj informiĝas, kial vi ne forveturis per la frua trajno. ni ne scias, kion diri al li. Cetere li volas paroli ankaŭ kun vi persone. Do bonvolu malfermi la pordon. Li certe havos la bonecon senkulpigi la malordon en la ĉambro". "Bonan matenon, sinjoro Samso", intervokis la prokuristo afable. "Li ne fartas bone", diris la patrino al la prokuristo, dum la patro ankoraŭ parolis ĉe la pordo, "li ne fartas bone, kredu min, sinjoro prokuristo. Kiel alie Gregoro do maltrafus trajnon! La knabo havas ja nenion enkape ol la komercon. Mi jam preskaŭ koleris, ke vespere li neniam eliras; nun li estis ja ok tagojn en la urbo, sed ĉiun vesperon li estis hejme. Jen li sidas ĉe ni ĉetabe kaj legas silente la ĵurnalon aŭ studas horarojn. Estas por li jam distraĵo, kiam li okupas sin pri arabeskosegado. Jen ekzemple li lignoskulptis, dum du, tri vesperoj, malgrandan kadron; vi miro, kiom bela ĝi estas; ĝi pendas ene en la ĉambro; vi tuj vidus ĝin, kiam Gregoro malfermos. Mi estas cetere feliĉa, ke vi estas ĉi tie, sinjoro prokuristo; ni solaj ne povintus igi Gregoron malfermi la pordon; li estas tiom obstina; kaj tucerte li ne fartas bone, malgraŭ ke matene li tion neis." "Mi venos tuj", diris Gregoro malrapide kaj singarde kaj ne moviĝis por ne perdi iun vorton de la paroladoj. "Alie, sinjorino, ankaŭ mi ne povas ĝin interpreti", diris la prokuristo, "espereble ne estas io grava. Kvankam mi devas aliflanke ankaŭ diri, ke ni komercistoj - kiel oni preferas: malfeliĉe aŭ bonŝance - negravan malbonfarton tre ofte, pro komercaj konsideroj, devas simple superi." "Do, ĉu la sinjoro prokuristo povas jam al vi eniri?" demandis la senpacienca patro kaj ree frapetis ĉe la pordo. "Ne", diris Gregoro. En la apuda ĉambro maldekstra estiĝis prema silento, en la apuda ĉambro dekstra la fratino eksingultis.

Kial do la fratino ne iris al la aliaj? Supozeble ŝi estis nur nun ellitiĝinta kaj ankoraŭ tute ne komencinta sin vesti. Kaj kial ŝi do ploris? Ĉar li ne ellitiĝis kaj ne enlasis la prokuriston, ĉar li estis en danĝero perdi sian postenon kaj ĉar tiam la ĉefo ree persekutis la gepatrojn per la malnovaj monpostuloj? - Tio estis provizore ja nenecesaj zorgoj. Ankoraŭ Gregoro estis ĉi tie kaj tute ne intencis forlasi la familion. Estis vere, ke li momente kuŝis jen surtapiŝe, kaj neniun konanta

lian staton serioze postulus de li, ke li enlasu la prokuriston. Sed pro tiu eta malĝentileco, por kiu ja poste facile troviĝos konvena elturniĝo, Gregoro ja ne bone povus esti tuj forpelata. Kaj al Gregoro ŝajnis, ke estus multe pli saĝe, lasi lin nun trankvila, anstataŭ lin ĝeni per plorado kaj urĝigo. Sed estis ĝuste la malcerteco, kiu premis la aliajn kaj senkulpigis ilian konduton.

"Sinjoro Samso", nun vokis la prokuristo kun levita voĉo, "kio do okazis? Vi jen barikadas vin en via ĉambro, respondas nur per jes kaj ne, faras gravajn, nenecesajn zorgojn al viaj gepatroj kaj neglektas - tio nur flanke menciante - viajn komercajn devojn en vere nekredbla maniero. Mi parolas ĉi tie en la nomo de viaj gepatroj kaj de via ĉefo kaj petas vin tute serioze pri tuja, neta klarigo. Mi miras, mi miras. Mi kredis koni vin trankvila, saĝa homo, kaj nun vi subite ŝajnas voli ekparadi per strangaj kapricoj. La ĉefo ja aludis al mi ĉi-frumatene eblan klarigon pri viaj mankoj - ĝi koncernis la enkasigon konfidatan al vi de mallonge -, sed mi donis vere preskaŭ mian honorvorton por tio, ke tiu klarigo ne povas esti ĝusta. Sed nun mi vidas jen vian nekompreneblan obstinon kaj perdas tute ĉian emon eĉ nur iomete pledi por vi. Kaj via situacio tute ne estas la plej firma. Mi havis unue la intencon, diri ĉion ĉi al vi inter ni solaj, sed ĉar vi jen perdigas al mi senutile la tempon, mi ne scias, kial ne ankaŭ viaj gepatroj eksciuj ĝin. Via laboro lastatempa estis do tre malkontentiga; kvankam ne estas la sezono por fari elstarajn negocojn, tion ni agnoskas; sed sezono por fari neniajn negocojn, tute ne ekzistas, sinjoro Samso, devas ne ekzisti."

"Sed sinjoro prokuristo", kriis Gregoro ekster si kaj forgesis en sia ekscito ĉion alian, "mi ja tuj malfermas, en tiu ĉi momento. Malgraava malbonfarto, vertiĝatako, malhelpis min ellitiĝi. Mi kuŝas ankoraŭ nun en la lito. Sed nun mi jam ree estas tute freŝa. -us mi ellitiĝas. Nur etan momenton da pacienco! Ankoraŭ ne iras tiom bone, kiom mi pensis. Sed mi fartas jam bone. Kiel tio nur povas ataki homon! Ankoraŭ hieraŭ vespere mi fartis tute bone, miaj gepatroj ĝin ja scias, aŭ pli bone, jam hieraŭ vespere mi havis etan antaŭsenton. Oni devintus tion vidi ĉe mi. Kial mi ne anoncis ĝin al la magazeno! Sed oni pensas ja ĉiam, ke oni venkos la malsanon sen hejmrastado. Sinjoro prokuristo! Indulgu miajn gepatrojn! Por ĉiuj ĉi riproĉoj, kiujn vi nun faras al mi, estas ja neniun kaŭzo; oni ja ankaŭ diris al mi pri tio neniun vorton. La lastajn mendojn, kiujn mi sendis, vi eble ankoraŭ ne legis. Cetere, ankoraŭ per la okahora trajno mi veturos vojaĝen; la kelkajn horojn da ripozo fortigis min. Antaŭ ĉio ne perdu tempon, sinjoro prokuristo; mi estos tuj mem en la magazeno, kaj havu

la bonecon, tion diri kaj doni mian respektan saluton al la ĉefo!"

(daŭrigota)

elgermanigis **Vilhelmo LUTERMANO** el Kubo

\*\*\* publikigita kun permeso de la tradukanto \*\*\*

Fonto: <http://vlutermano.free.fr/transformigxo.html>

\* *Franz KAFKA naskiĝis la 3-an de julio 1883 en Prago, mortis la 3-an de junio 1924 en Kierling [Kirling] (Aŭstrio) estis aŭstra germanlingva verkisto de noveloj kaj mallongaj rakontoj.*

## El la libro de "Dao De Jing" verkita de ĉina filozofo Laocio, fondinto de Taoismo (42)

### DUA PARTO - LA VIVO



67

**Ĉiuj en la mondo diras, ke mia TAŬO estas ja granda,**

**sed kvazaŭ neuzebla.**

**Ĝuste tial, ĉar ĝi estas tiom granda,**

**ĝi estas kvazaŭ neuzebla.**

**Se ĝi estus uzebla,**

**ĝi delonge estus fariĝinta malgranda.**

**Mi havas tri trezorojn,**

**kiujn mi ŝatas kaj konservas.**

**Unu el ili estas: la amo;**

**la dua nomiĝas ŝparemo.**

**La tria estas ne kuraĝi stari en la mondo antaŭe.**

**Pro la amo oni povas esti kuraĝa,**

**pro ŝparemo oni povas esti malavara.**

**Se oni ne kuraĝas anstaŭstari en la mondo,**

**oni povas esti la kapo de la pretaj homoj.**

**Se oni nun volas esti kuraĝa sen la amo,**

**se oni nun volas esti malavara sen ŝparemo,**

**se oni nun volas antaŭeniĝi sen stari**

**malantaŭe,**

**tio estas mortiga.**

**Se oni havas amon en la batalo,**

**oni venkas.**

**Se oni havas ĝin ĉe la defendo,**

**oni estas nevenkebla.**

**Tiun, kiun la ĉielo volas savi,**

**ĝi gardas per la amo.**

**Rimarkoj de Anniespera:**

„Ĉiuj en la mondo diras, ke mia TAŬO estas ja granda, sed kvazaŭ neuzebla.“

Pri tiu ĉi frazo, la plej akceptita kompreno en Ĉinio estas tia (citita el la traduko de Wang Chongfang):

„Sed ĝi ne estas kiel io ajn konkreta.“

Vilhelmo:

„Se oni nun volas esti kuraĝa sen la amo,“

En originalo la vorto „jin“ (fonetike) signifas „hodiaŭ, nuntempe“, anstataŭ „se“.

Vilhelmo:

„Se oni havas ĝin ĉe la defendo,

oni estas nevenkebla.“

En originalo la vorto „gu“ (fonetike) signifas „plifortiĝi“, anstataŭ „esti nevenkebla“.

**Citaĵo de B.Traven**

La trezoro,

kiun trovi laŭ vi

ne indas la penon

de vojaĝo, ĉu?

Tio estas la vera trezoro,

kiun serĉi laŭ vi via vivo

ŝajne estas tro mallonga!

La brilanta trezoro,

kiun opinias vi,

troviĝas sur la alia flanko!

*El la romano „Trezoro de l' Sierra Madre“*

(daŭrigota)

### Sun-radio

Kun tim' vi venas  
al mi kaj petas  
etan kareson,  
ĉar via sento  
pro malkontento  
ne plu koleras.  
Mia kareso  
estos balzamo  
por via vundo,  
kaj mia kiso  
la komplemento.  
En ĉi momento  
venu sen timo  
kaj sen hezito,  
ĉar mi bezonas  
el viaj lipoj  
sunan radion.



decembro 2019

verkis **Angel Arquillos** el Hispanio

Albert Goodheir (1912-1995)

de la birdo venkas la tempon super ŝtono:

**A**lbert Goodheir estis nederlandano laŭ deveno, sed vivis en Skotlando. Lia vivo estis, laŭ liaj propraj vortoj, "iom nekonvenca kaj ne mankis en ĝi varieco". Sian infanaĝon li pasigis en Amsterdamo. Dum la dua mondmilito li partoprenis la Nederlandan Rezistadon kaj helpis al judoj trovi sekurajn kaŝejojn. Post la milito li transloĝiĝis al Britio, studis teologion en Glasgovo kaj filozofion en Londono. En Birmingham li studis por fariĝi misiisto kaj estis sendita por fariĝi pastro en la Skota insulo Tiree, la plej okcidenta insulo de la Hebridoj, kie li pasigis dek jarojn. Poste li pasigis ankoraŭ pliajn jarojn en la fiŝista vilaĝo de Tayvallich en la regiono de Argyll. En tiu tempo li lernis la gaelan lingvon. Pli poste li forlasis la Eklezion de Skotlando pro malkonsento pri doktrino kaj tiam konsideris sin "ŝafisto gregperdinta". Poste li fariĝis kvakero. Kelkajn jarojn li laboris kiel instruisto de lingvoj kaj historio. Unu jaron li laboris en bieno en Kostariko. Dum kelka tempo li laboris kiel helpflegisto de mensaj malsanuloj. La vivo de Albert Goodheir estis ja nekonvenca kaj varia. Kaj mi ankoraŭ ne menciis tiun gravan flankon de lia vivo, kiu koncernas Esperanton.



Goodheir lernis Esperanton en 1967, relative malfrue en sia vivo, tiam 55-jara. Li tuj trovis harmonion inter la internacia lingvo kaj siaj ideoj pri paco kaj justeco kaj same konstatis la esprimriĉan kapablon de la lingvo. Li tial elektis Esperanton sia verkista esprimo kaj baldaŭ fariĝis fekunda poeto kaj tradukisto. Ekde 1974 ĝis 1989 aperis de li 16 verkoj originalaj kaj tradukitaj. Li ankaŭ estis ĉiam multflanke aktiva en la Esperanto-movado, estis ekzemple redaktoro de la revuo Esperanto en Skotlando kaj membro kaj sekretario de la Akademio de Esperanto.

Goodheir komencis verki poemojn en Esperanto baldaŭ post sia esperantiĝo kaj aperigis sian unuan poemaron, Merlo sur menhiro, en 1974. La libro portas la titolon de la unua poemo, kiu bele sugestas lojalecon de la poeto al tio, kion li trovas fidinda. Merlo estas birdeto, kiu tre bele kantas, menhiro estas granda ŝtono starigita antaŭ jarmiloj de forgesitaj homoj. Pluvo trivas, erodas la menhiron, sed la kanto

*Pluvo trivas  
la graniton  
kiun starigis  
antaŭ jarmiloj  
manoj de triboj  
forgesita.  
Ho feliĉo  
de merlokanto  
ĉe tagiĝo  
venkanta tempon  
super ŝtono.  
Tra jarmiloj  
dum miaj manoj  
estos polvo,  
kantos la merlo  
ĉiun jaron.*

Malgraŭ bona akcepto de la legantoj kaj dua eldono kvin jarojn poste, pasis multaj jaroj ĝis li aperigis sian duan originalan poemaron, Enlumiĝo, 1987. Tio ŝuldigas al longa listo de tradukoj, pri kiuj Goodheir montris eminentan talenton. Ekde 1975 ĝis 1994 aperis de li 12 verkoj, 7 tradukitaj el la klasikaj lingvoj, antikva greka kaj latina, kaj 5 el la angla. Li tradukis tri tragedojn de Eŭripido, unu de Esĥilo kaj du verkoj de Platono. El la latina li tradukis Konsolo de la filozofio de Boethius. El la angla li tradukis i.a. D-ro Jekyll kaj s-ro Hyde de R. L. Stevenson kaj la dramon La petolulo de la okcidenta mondo de John M. Synge.

En sia dua poemaro, Enlumiĝo, la poeto prezentas sian amon al la naturo kaj al la filozofio pli intime ol en sia unua poemaro antaŭ 13 jaroj, jen ekzemplo:

*Senhalte la vivanta universo  
elverŝas sin torente,  
en monda epopeo ĉiu verso  
atestas elokvente.  
Dum mi kunstaras kun la kontinuo  
atente kaj silente,  
dum mutas mio, la interna bruo,  
eĉ nur momente.*

Siajn lastajn poemojn Goodheir aperigis en Nordmara duopo 1994, en komuno kun Reina de Jong, nederlanda Esperanto-poetino.

Goodheir ankaŭ abunde verkis proze. Li doktoriĝis pri filozofio kaj verkis monografion pri la nederlanda filozofo Spinozo. Li redaktis la duan



volumon de Angla Antologio (1987). Li direktis propran eldonejon, Kardo, dum jaroj, kie li aperigis grandparte siajn verkojn.

Albert Goodheir estas foje nomita la "kvina kvaropano" kun referenco al la kvaropo "Skota skolo" de Esperanto-poetoj (William Auld, John Francis, John Dinwoodie, Reto Rossetti). Liaj verkoj, originalaj kaj tradukitaj, kaj lia sindona laboro por la Esperanta movado en Skotlando kaj internacie, noble meritigas

lian lokiĝon en tiun grupon de esperantistaj verkistoj.

de **Baldur Ragnarsson**

(Juna amiko)

Fonto: <http://esperanto.net/literaturo/tekstoj/ragnarsson/goodheir.html>

## LUPO KAJ GRUO

fablo de Ivan Andrejevich Krilov (1769-1844) Rusio

La lupo estas best' avida:  
Ghi ne flankigas ostojn per la dent'  
Dum mangh' rapida  
Kaj jen al unu lup' okazis akcident'  
De ost' misgluta estis ghi viktimo.  
Ne eblas nun por Lupo spir' au ghem',  
Kaj kaptas ghin la antaumorta trem'!  
Felicite Gruo estis en proksimo;  
Per gestoj Lup' klarigis pri dolor'  
Kaj petis helpon en sufera hor'.  
En lupan faukon Grao bekon shovis  
Kaj post grandega pen' eltiri oston povis.  
Jen petas li premion por labor'.  
"Vi mokas min!" ekkrias best' insida:  
"Chu indas vi? Sendanka kaj perfida!  
Chu vi ne devas danki kun respekt',

Ke via stulta kap' ja restis sen difekt'?  
Forighu tuj! Liberon vi profitu  
Kaj gardu vin, amik': estonte min evitu!»



verkis **Ivan Andrejevich Krilov** (1769-1844) Rusio  
tradukis **Sergej Grigorjeviĉ Rublov** (1901-1979)  
Ukrainio

## Vendrede, la 24-an de januaro 1997 <sup>1</sup>

tradukis kaj sendis **Carmel Mallia** el Malto


kiam la lastaj pezaj sonoj de l' « Antaŭnokto » <sup>2</sup>  
bombardas miajn orelojn  
kaj el la fenestro mi rigardas la infanojn ĝoje  
ludantajn  
mi sentas la koron ŝokiĝi  
dum larmoj ekaperas ĉe l'okuloj

antaŭ mi tratrotas  
la malklara filmo de l'pasinto

ĉar eĉ mi iam  
trakuris gaje, ludante,  
ĝis la arso senhalte ĉirkaŭirante super mi  
gustigis al mi la amaron de l'vivo

nu mi tuj maljuniĝis  
kaj komprenis  
ke eĉ mia vivo  
entenas la tagon kaj la nokton  
kaj mi sentas la malvarmon  
kaj timas la noktojn  
vestigontajn la estonton

**Alfred Massa** : estas Malta poeto kiu riĉigis la maltan literaturon per diversaj poemlibroj kaj maltlingvaj romanoj. Li estas ankaŭ beletristika kritikisto.



<sup>1</sup> Ĉi tiu poeto ĉiam titoligas siajn poemojn per la tago, kiam li verkas siajn poemojn. (Mia noto)

<sup>2</sup> La poeto mencias la iaman kutimon en Malto, kiam vespere la preĝejoj anoncis la nokton sonorante la « Ave Maria », -- Saluton Maria -- petante protekton de Nia Sinjorino. Tio ne plu kutimas. (Mia noto)



tradukis kaj sendis **Carmel Mallia** el Malto

**J**apanio estas la sola lando, kiu suferis pro atombomboj, tial multaj japanoj opinias, ke Japanio devas gvidi la mondon al sennukleara mondo, ratifante “la Pakton pri malpermeso de nukleaj armiloj” adoptitan en la Unuiĝintaj Nacioj la 7an de julio 2017.

Tiu pakto estis malfermita por subskribo la 20an de septembro 2017 kaj post ratifado de 50 ŝtatoj ĝi ekfunkcios. Antaŭ la 28a de februaro 2018, 56 ŝtatoj subskribis, el kiuj 5 ratifis ĝin. Sed strange Japanio rifuzis subskribi la pakton kun jena preteksto:

*“Japanio estas la sola lando, kiu suferis pro la atombomboj, tial ĝi havas la komunan celon aboli nukleajn armilojn. Tamen aliflanke Norda Koreio ekspluatas nukleajn armilojn, kaj tio estas tre serioza kaj urĝa minaco al paco kaj stabilo de la internacia mondo. Al la landoj kiel Norda Koreio, ordinarnaj armiloj ne efikas, tial Japanio bezonas subtenon de Usono, kiu posedas nukleajn armilojn, sub la koalicio inter Japanio kaj Usono.*

*Se Japanio tuj ratifos la pakton, kiu malpermesas nukleajn armilojn, tio damaĝos justecon de la nuklea politiko de Usono kaj danĝerigos la vivon de la japanoj.* “

Kontraŭ la japana registaro multaj homoj protestas. Precipe tiuj, kiuj postvivis la atombombadon en aŭgusto 1945, forte deziras, ke Japanio ratifu la pakton. Hodiaŭ mi tradukos spertojn de atombombitoj en Hiroŝima kaj Nagasaki el artikoloj aperintaj en ĵurnaloj.

verkita kaj tradukita de **Hori Jasuo** el Japanio

**5) Mi rakontados pri teruro de atombombo**



Verkita de s-ro Jamaŭaki Joŝiroo 85-jara, loĝanta en Nagasaki, tradukita el la artikolo de la ĵurnalo Akahata la 30an de julio 2019

(Foto: li parolas en la ceremonio en Nagasaki)

Kiam komenciĝis la dua mondmilito, mi estis en la dua lernoĵaro de elementa lernejo. en Nagasaki. La milito ankoraŭ daŭris, kiam mi estis en la 6a lernoĵaro. En tiu somero Usono bombis Hiroŝima-on kaj Nagasaki-on per atombomboj. Mia familio konsistis el 9 familianoj; gepatroj kaj 7 infanoj. Tiun tempon mia patrino rifuĝis al sia eksa familio kun siaj kvar gefiloj. La 9an de aŭgusto mia patro iris al la fabriko de elektra kompanio Micumiŝi kaj mia pliaĝa frato iris al fabriko por fari armilojn.



Kiam mi eniris en la maĝcambron de la verando kun mia ĝemela frato, dirante, “Mi estas malsata!”, blua lumo trakuris la domon kun bruego. Kiam mi levis mian kapon, mi trovis, ke la muro falis, tegiloj kaj mebleoj estis disĵetitaj sur la plankon kaj la tegmento malaperis. Mi povis vidi la ĉielon.

Unu horon poste mia frato revenis hejmen. Ni kune rifuĝis al la najbara ŝirmejo. Ĝi jam estis plena de virinoj kaj infanoj. Infanoj, kiuj estis ekster la domo, brulvundiĝis sur la nudaj korpopartoj kaj aliaj kriis pro pikvundoj de vitraĵoj.

Ni atendis mian patron dumnokte. En la venonta mateno ni triope iris al la fabriko de mia patro. Ĝi situis 500 metrojn for de la epicentro. Sur la stratoj multaj homoj kuŝis mortaj. En riveroj floris multaj kadavroj. Mi vidis junulinon kun blanka zono en la rivero. Mi pli bone vidis ŝin kaj trovis, ke ĝi ne estis zono, sed intesto eliĝinta el ŝia ventro.

La fabriko de mia patro detruigis nur kun skeleta feraĵoj. Mia patro fariĝis nigre ŝvelinta kadavro same kiel aliaj homoj. Ni bruligis lin surloke, kolektinte restintajn lignaĵojn. Ni preĝis por li, plektante manojn. Kiam mi levis mian vizaĝon, mi vidis liajn piedojn en flamoj. Mi ne povis plu vidi tion. Homoj de la kompanio diris al ni, ke ni revenu la sekvantan tagon. En la sekvanta mateno ni iris al la kompanio. Kadavro de mia patro ne estis plene bruligita. Kiam mi provis preni oston el la kranio, ĝi rompiĝis. Terurite ni forkuris. Ankotaŭ nun mi foje rememoras tiun pejzaĝon.

Post emeritiĝo, mi laboras kiel rakontisto pri la tragedio en “Pacasocio de Nagasaki”. Mi rakontas ne nur pri mia sperto, sed ankaŭ pri teruro de atombombo, nome varmega lumo, eksploda ventego kaj radioaktiveco. Nur en la lasta jaro mi prelegis 50 fojojn. Pri la teruro de radioaktiveco, mi parolis pri miaj oftaj malsaniĝoj. Kiam mi estis 32-jara, mi enhospitaliĝis pro akutaj hepatmalsano kaj nefrito. Ekde tiu tempo mi enhospitaliĝis 15 fojojn antaŭ mia emeritiĝo. Mi opinias, ke tio estis kaŭzita de

**“Proponi Trankvilan Morton”  
Kiel ni renkontas nian lastan momenton?**

de Dr. Isitobi Kozoŭ

(Kobe ĵurnalo 2019/06/10 08/26:  
vespera ĵurnalo, ĉiu sabato)

**Dr.** Isitobi Kozoŭ naskiĝis en la jaro 1935 en gubernio Hiroŝima, Japanio. En la jaro 2005, li konvertis de la Tokjo Saiseikai Centra Hospitalo kiel kirurga doktoro al la speciala maljuna protektaĵo “Aŝihana Kadukulejo” (Setagaja, Tokjo) kiel regula doktoro. En la jaro 2005, li proponis la trankvilan morton. Poste, li kontinue ekspedas la meriton per diversaj rimedoj de la kadukulejo.

Mi deziras proponi trankvilan morton kiel la ideala rimedo por la fino de la vivo.

(daŭrigata)

**9 La signifo de la kuracado en grandaĝula societo**

Nun mi deziras paroli privatan memoraĵon. Iu instruisto rememorigas al mi, kiu komencis studi nekutiman medicinon en la 70 jaroj. Lia nomo estas Hijama Tacuto, kiu estas la instruisto respondeca pri klaso en elementa lernejo dum tri jaroj de la 4-a lernejarlo. En la 6-a de aŭgusto, ni estis en la lerneja grundo de la urbeto Josida, gubernio Hiroŝima (nun urbo Aki-Takata, gubernio Ŝimane), kaj vidis la ekŝvebon de purblanka fungonubo trans montoj de urbo Hiroŝima. Ĝi estis la ĵeto de atombombo pro nekredbla homara frenezo. Post 9 tagoj, la dua mondmilito finis. Tiam la instruisto diris, “Mi ne jam estas kvalifikita instrui vin,” kaj restis en stuporo. La sceno estas restanta en mia koro. Tamen li daŭris instrui, kaj plie fariĝis lernejestro. Poste li eniris en budhana vojo. Okaze de partopreno en la batalo kontraŭ la Pakto pri Sekureco inter Japanio kaj Usono ĉe Tokjo en 1960 jaro, li estis frapita pro la morto de f-ino Kamba Miciko. Sur la vojo al Hiroŝima, li adorvizitis templon en Kjoto. Konsiderante la faktojn, li probable pripensis profunde pri la homa vivo kaj morto. Kiam la duonjarcento jam pasis post nia diplomiĝo, ni ricevis de li broŝuron, sur kiu estas larĝe skribita aŭtografe la malfacila ĉina letero, kio signifas laŭ leksikono de ĉinaj literoj “la vojo al tombotruo” aŭ “la ekstremo de la tero,” sed oni diris ke li pensis la

ĉinan leteron kiel “la ambicion de vivdaŭra akademiulo”. Mi sentis, ke lia sincera vivmaniero ĝis vesperaj jaroj penetris en mian koron.

Antaŭe doktoroj estus bona unu aspekte se ili nur celus kuraci malsanulon kiel krizon en la pacenta vivo. Sed en tia grandaĝula mondo, ni multe ekzamenas la kadukecon kiun ni ne havas la rimedon kuraci. Ni havas nenion alian ol konsideri kio estas kuracado.

Kiam ni ekzamenas la kadukecantojn, ni estas demandita kiel ni devas stari ĝuste antaŭ ilia viv- kaj fin-manieroj. En ambaŭ flankoj de terapio kaj prizorgo ni devas respondi tuj laŭ la postulo kaj rudri. Mi ŝajnas iri ĝismorte sur sciencista vojo.



**10 Bonvolu konsideri pri la trankvila morto antaŭ ol tia tempo venos.**

La japana kriminala juro estas establita en la Meiji-epoko(1868-1911), kaj grade ŝangita laŭ la erao. En tia grandaĝula socio, estas la artikoloj kiuj havas problemon kompreni. Tio estas la 218a kaj 219a artikoloj decidita la krimojn por forlaso kaj por senintenca mortigo kaj vundado de prizorga respondeculo. En la nuna epoko, kiam multaj personoj atingas la grandaĝojn en la 80-a aŭ 90-a, severa estas la problemo kiel ni devas respondi al la fina stadio de la kadukeco. Se ni havus la metodojn vivlongiĝi en kiaspeca finstadio kaj lasus ĝin, ĉu ni estus punita? S-ino Haŝida Sugako, fama kiel la aŭtoro de “Oŝin,” kontribuis al la monata gazeto, “Bungei Ŝunĵu” en la jaro 2016 jene: “Mi volas forlasi eŭtanazie,” kio kaŭzis diskuton demandi ĉu ĝi estas jes aŭ ne. “Se mi estus en demenco, mi volas forlasi eŭtanazie.” “Mi jam ne deziras vivi se mi ne havus ĝojon en vivo.” La kontribuoj tial rekomendis ke en Japanio ankaŭ eŭtanazia morto devas esti konfirmata. En la jaro 2018, la impulsa afero okazis. Nome S-ro Seibu Susumu, fama kritikisto, elektis morti mem. La elekto ankaŭ kaŭzis diversajn diskutojn, sed la sekvanta frazo en sia artikolo restis en mia memoro. “Taksante alte human vivon kiu estas nur maniera valoro, la principo de vivo unue forlasas tutan juĝon de valoro pri la celo.” Li tiel asertis, “Ne nur rigardu vivon kiel gravon, sed meditu profunde pri vivo kaj morto starante kontraŭ morto.” Kompreneble, la demando kiel morto devas esti, ne estas tiel facila respondi. Tamen estas necese kompletigi vivon en la formo kontentigi la koncernaton kaj familianon.

Mi pensas, ke la trankvila morto post kadukeco estas ideala. Se la kadukeco estus konfuzita kun la esperebla malsano, kaj medicino estus trudita, oni estus kondukita al la maltrafa vojo.

Ĉu koncernato kaj la familiano konsideri pri la trankvila morto antaŭ ol tia tempo venos.

Renkontante grandaĝulan socion en tuta mondo, mi sentas profunde ke jam venis la erao kiam ni devas utili la eltrovitajn sciencojn por la natura providenca kadukeco.

(Fino)

tradukis kaj sendis **Kacu Matoba** el Japanio

## Poeziaĵoj de Ilir Zhiti

## tradukis kaj sendis Bardhyl Selimi el Albanio

### Senkapigo

*Spektante makabrecan scenon kie soldato de ISIS senkapigas, sen ia ajn konsciriproĉo, malfelicxulon, mi verkis la sekvantajn versojn.*

Senkapigi homon  
tutsimpla kaj facila estas  
kun la ruliĝanta kapon  
sangumita lastfoje  
ruliĝas ankaŭ mem Planedo  
je sangoplenta formo  
de kruise hakita kapo.

En momenteto kiam homo  
senkapiĝas  
homo kiel mi kaj vi  
la oceanaj ondoj inundi endas  
ĉiun teran parton  
je ululado pro doloroj.

Kun la hakita kapo  
jam mortis ankaŭ Universo ene de  
li

mortis ja vivomemoro, perdiĝis  
ĉiuj multaj vizaĝoj  
konataj dum lia vivo,

plue ĉiuj lernitaj scioj  
kaj tiuj hereditaj dum miljaroj  
perdiĝis amoj, revoj, deziroj  
kontinueco fontanta ekde pli fora  
pratempe  
sed nun ĉiuj interrompitaj...

Li estis vera homo kiel ĉiuj  
kaj ceteruloj estis ja similaj al li  
Sen vivo de individuoj  
eĉ Universo perdas sian signifon

Ili estas ja ĝia memoro  
Kiam homo senkapiĝas

tio tutsamas kvazaŭ mortiĝis  
ĉiuj kiuj bonŝancis naskiĝi en ĉi tiu  
Mondo.

Por kiu ajn ido de detruo  
Ĉi ago tutsimplas kaj facilas  
Eble ankaŭ Dio mem  
sentas sin malkvieta  
ke sia "ĉefverko"  
kruise sin mem  
estas detruante.

### Epitafo

Ni skulptas ĉiuvivmomente  
literon de nia epitafo  
kaj ceteruloj nur ilin metas  
ĉe nia kapo poreterne

Tirana, 3-an de majo 2017

### Egoismo

Pli multe ni volas  
amojn kiuj neniam realiĝis  
urbon kie neniam ni povis iri  
librojn kaj poeziojn kiujn ni ne  
komprenis komplete  
tiuj plurestis pli longe en nia  
memoro,

ofte ni amas pli multe diktatoron  
kiu turnas nian vivon al penado  
kaj justulojn kaj idealistojn  
ni vidas dubeme en iliaj celoj

Ni adoras tiujn kiuj nian amikecon  
ne akceptas  
ofte ni virinon neglegtas  
kiu fidele restas apud ni  
ni frenezas pro sciencoj kaj scioj

kiujn neniam ni asimilis  
enamiĝinte ni estas  
freneze  
al nia egoismo  
nekorektebla




Tirana, 31.10.2017


### Senco de vivo

Oni diris ke ĉe iu ajn vizaĝo  
virina estas iom da Heleno  
lu ajn virina vizaĝo  
donas sencon al vira vivo.

Ĉiu vira vizaĝo  
donas feliĉon al virina vivo  
Ĉiu infano, frukto  
de ilia amo  
donas sencon kaj feliĉon  
al ambaŭ kune..

Tirana, 22.12.2017





### Kain kaj Abel

**K**ain kaj Abel komence vivis en komuna groto. Kune ili iradis por ĉasi. Ili ĉasis multajn antilopojn. El ties tibioj ili faris tranĉilojn, per ĝi ili fratece dividis la viandon, purigis la ledon, ŝmiris ĝin per ostmedolo por ke ĝi faru glata kaj pretigis el ĝi vestaĵojn.

Sed la sinjoro benis iliajn edzinojn kaj tiuj naskis multnombrajn familianojn, do, fine la groto fariĝis malvasta por ili ambaŭ.

Troviĝis proksime ankaŭ alia groto, en kiu vivis la glavdenta tigro kaj endanĝerigis la vivon de ili ambaŭ. Do, ili kune alŝteliĝis, bruligis fajron antaŭ la faŭko de la groto kaj kiam la tigro elsaltis, ĉiuj samtempe komencis ĝin ŝtonĵeti. Krome cent kaj cent ŝtonpintaj ĵetlancoj flugis al la besto kaj fine ili sukcesis ĝin mortigi. Poste en la malplenan groton enloĝiĝis Kain kun siaj familianoj.

Ĉi tiu sukceso instruis ilin, ke pli oportune estos kune ĉasadi ankaŭ estonte. La du familioj, kune agantaj, povis ĉirkaŭstari la aron de hiparionoj, peli ilin sur la monton, kie la timigitaj praĉevaloj unu post la alia saltadis en la abismon. Kain kaj Abel fratece dividis inter si la multan viandon. Poste ili jam povis ataki ankaŭ la mamuton kaj per la grasaĵo de la lanhava kamelo, kiu grasaĵo troviĝis en ĝia ĝibo, ili lumigis la groton. Cetere sur la muroj de la groto ili ĉizis belajn ĉasbildojn per tajlita fajroŝtono.

La vivo fariĝis ĉiutage pli bona, ili benis la nomon de Adonajo kaj la fratecan kunsenton, la pacon, al kiu ili povis danki ĉion ĉi.

Ĉi-tempe okazis, ke la Serpento ekenuis la solecan vivon en la senhoma Paradizo kaj ekiris por serĉi la homojn. Tiel li venis al la groto de Kain.

— Diru al mi Kain, — ĝi komencis, — ĉu vi ne timas pro Abel?

— Kial mi timus pro mia sampatrano?

— Nu, pro tio, ĉar li havas ĉiutage pli da ŝtonpintaj ĵetlancoj. La pintoj de liaj sagoj pretiĝas el la kornaroj de la cervoj kaj ili estas tiom akraj, ke ili trapikas eĉ la haŭtegon de la arbara elefanto. Eĉ vi mem jam vidis!

— Kiel do ĉasfaligi la elefanton, se lia sago ne estas akra?

— Nunu! Bone! — diris la serpento. — Mi nur menciis.

Kaj poste ĝi iris al Abel kaj tie rakontis la samon pri Kain.

Kain kaj Abel tiutage malfacile endormiĝis. Sekvonttage Kain kunvokis siajn familianojn kaj ekparolis al ili jene:

— Miaj familianoj! Nenia afero estas pli malbenita, ol la dispartiĝo kaj malkonkordo. Inter la homoj devas regi paco kaj kunsento. Tiu, kiu endanĝerigas tiujn, riskas la vivon kaj feliĉon.

— Prave patro! — respondis la familianoj.

— Ĉar imagu nur, — li daŭrigis, — kio okazis, se ni malpaciĝus inter ni. Se ni devas uzi parton de nia laboro, por pretigi lancojn kaj sagojn kontraŭ la alia familio ne povu nin kaŝataki. Se ni ne ĉasadus kune kun la abelanoj, sed ni disiĝus al du partioj, nur ties duonoj povus iri ĉasadi, ĉar la aliaj duonoj devus observi la malamikon. Ĉu ne, tiel ni povus ĉasi malpli multajn antilopojn?

— Ni malsatmortus — respondis unu el la filoj.

— Kaj intertempe ekstermus nin la glavdenta tigro — aldonis la dua.

— Nu — daŭrigis Kain, — mi ricevis bedaŭrindajn informojn pri tio, ke la abelanoj intencas perturbi ĉi tiun kunsentan pacon. Laŭ certaj famoj ili pretigas armilojn kontraŭ ni.

— Domaĝe, — ili respondis. — Ni devas nepre subteni la pacon.

— La saman intencas ankaŭ mi, — jesis Kain. — Tiel decas al pacema familio. Ni neniokaze rompos la pacon, ni eĉ garde observos por malebligi, ke inter ni iu ajn malamikiĝu kontraŭ la abelanoj. Mi tre bedaŭrus, se la abelanoj tamen atakus nin, ĉar tiuokaze ni povus la pacon restarigi nur per armiloj, kiu jam ne estas paco. Sed kiel ajn mi cerbumas, mi ne povas eltrovi alian rimedon. Tiu, kiu volas pacon, vole-nevole devas batvenki tiun, kiu volas interbatadi. Mi estus tre malĝoja, karaj gefiloj.

Pro tio ĉi ili tre ĉagreniĝis same kiel ilia patro. Kelkaj proponis kunveni kun la abelanoj, aranĝi la aferon kaj atingi pacan interkonsenton. Sed aliuloj pridubis la sukceson de tiaspeca intertraktado.



— Ĉar, — ili diris, — se la abelanoj pretigas la armilojn, vere kontraŭ ni, tion ili nepre neos. Ili diros, ke la armiloj pretiĝas kontraŭ la glavdenta tigro. Kaj se ni petus, ke ili ne faru tion, ili pensus, ke ĝuste tial ni petas, ĉar ni mem intencas ilin ataki, do, des pli intense ili prepariĝus por la atako, eĉ se ili ĝis nun ne faris. Plej oportune estas diri nenion pri la afero, sed kaŝe pretigi pli multajn kaj pli akrajn sagojn por sekurigi la pacon de nia popolo.

Pri ĉi tio ili interkonsentis.

Poste iu el la filoj eltrovis, ke, se oni ŝmiras la pinton de la sago per la veneno de la akonito, la sovaĝbesto, trafita per ĝi, rapide mortas eĉ pro la plej malgranda vundo kaj tiu estis taŭga armilo kontraŭ la glavdenta tigro.

Dum la unua momento ĝi vekis grandan ĝojon: kiom multe da felo estos kaj kiom multa oleo por la meĉoj! Sed Kain, per la saĝeco de la maljunuloj tuj komprenis la situacion kaj ties konsekvencojn.

Li ordonis, ke la aferon oni severe devas sekreti. Dum la komunaj ĉasadoj oni ne rajtas uzi la venenon de la akonito por eviti, ke tion ekkonu la abelanoj. Sed en kaŝita angulo de la groto estu poto, plena de tiu ĉi veneno, por ke ili tuj povu preventi ĉiaspecajn ekagojn por rompi la pacon.

La ordonon ĉiuj akceptis aprobe, nur unu filo, Hanok aŭskultis ĝin kapskue:

— Neniel plaĉas al mi ĉi tiu afero, ĉar pli-malpli frue ĝuste el ĉi tiu fariĝos la interbatado.

Nature, la sekreto de la akonitveneno dum mallonga tempo malkaŝiĝis. Abel foje demandis Kainon, kial ili amasigas ĉi tiun danĝeran venenon.

— Bone vi scias, — respondis Kain, — ke en ĉi tiu groto loĝis iam la glavdenta tigro. Neniu scias, kiam revenos ĝia raso.

Abel profunde ĉagreniĝis. Tamen do pravintus la serpento? Kaj tiatempe li nenion kredis al ĝi!

Li kunvokis lian familianaron kaj komunikis lian sperton. Multaj el ili proponis pretigi pli multajn sagojn por la sekureco. Aliuloj timis, ke tio vekos malbonon,

ĉar eble la kainanoj miskomprenus, pensante, ke la abelanoj intencas ataki ilin. Precipe Abel mem akcentis, ke ili nepre devas subteni la bonan kontakton kun la gefiloj de sia frato kaj eviti eĉ la ŝajnon de la malboniĝo de la interrilato.

Ĉi tiun opinion ĉiuj akceptis. Ĉiuj sentis fratame al la kainanoj.

Fine ili decidis, ke por certeco, ankaŭ ili plenigas poton per la veneno de la akonito kaj pretigos pli multajn sagojn, sed la afero restu severa sekreto, ĉar la fratecan interrilaton oni nepre devas subteni kaj la tuta armiĝo estas nur, por ke transflanke oni ne povu perturbi la familian konkordon.

Kaj post mallonga tempo Abel havis pli multan armilon, ol Kain.

Kiam Kain eksciis tion ĉi, li certiĝis pri sia malnova timo. La kainanoj kunvenis por interkonsiliĝo kaj konstatis, ke la abelanoj vere klopodas rompi la pacon kaj oni devas timi pro atako. Do, pro tio ili devas ĉesigi la komunajn ĉasadojn por eviti la okazon de intermalamikado. Ekde nun la kainanoj solaj iris al ĉasado, sed nur la duono de la popolo, ĉar la alia duono gardis la groton kaj pretigis armilojn por sekurigi la pacon. Sed ili zorge atentis, ke neniu perturbu la bonan interrilaton.

Jes, tiel okazis. Nature, la predo malmultiĝis, ili distribuis ĝin inter si per pli granda pedantemo kaj al la filoj oni klarigis, ke la malpli abunda distribuo estas severa neceso, ĉar aliokaze endanĝeriĝus la hejma fajrujo kaj la ĉiutaga antilopviando.

Ĉi tion ĉiuj komprenis kaj aprobis, nur Hanok grumblis:

— Mi ja diris, ke iom post iom naskos la aferoj malbonan. Laŭesence same Kain, kiel Abel incitas la familianojn unu kontraŭ la alia. Ambaŭ estas lupoj en homaj haŭtoj, kiuj ne domaĝas buĉigi siajn familianojn por siaj propraj aĉaj intereso.

Pluraj aprobis la vortojn de Hanok, kaj Kain per dolora koro vidis, ke la forto de liaj filoj malgrandiĝas kontraŭ la ekstera danĝero. Tial li komence milde atentigis Hanokon pri liaj eraroj kaj poste severe punis lin.

La amikoj de Hanok el ĉio ĉi konvinkiĝis nur, ke Kain nepre intencas forbuĉigi sian popolon, ĉar li spasme volas manenteni la potencon.

La samo okazis ĉe Abel: la duono de la familianoj ĉasis, la alia armile gardis la pacon. La malkontentulojn ili punis.

Kain kaj Abel fine konvinkiĝis, ke ili mem vane klopodas vivi en fratece bona rilato al la alia, se tiu alia senĉese pretigas nur armilojn, dume li vid-al-vide atestadas sian fratecan bonintencon, por forturni la

atenton pri siaj malamikaj kaŝintencoj. Ili devis per profunda ĉagreno konstati, ke la paco estas savebla nur, se ili neniigos la pacrompantan alian familion. Ili jam eĉ sopiris la eksplodon de la interbatado, ĉar jam ankaŭ interne troviĝas tiuj, kiuj malalte taksas la eksteran danĝeron, kaj por tio malfortigas la familion. Tiuj vekigoj nur tiam, kiam eĉ ili vidos la danĝeron. Sed ambaŭ amis unu la alian kaj ili povintus interbatali nur pro ekstrema neceso. Kaj ĉi tiun neceson ili jam avide atendis.

Fine ankaŭ tio alvenis. La abelanoj vundis hiparionon, kiu trakuris al la kainanoj. Tiuj mortigis ĝin kaj hejmenportis, pro kio la abelanoj alvenis kaj repostulis la predon. La kainanoj, por defendi sin, pafis kelkajn sagojn al la atakantoj kaj ambaŭ familioj komencis la militon, altrudititan de la alia familio.

— Nu, — diris Hanok, — ĉu mi ne diris? Homoj, kiuj neniam pekis unu kontraŭ la alia, nun estas devigataj mortigi sin per la alia grupo kaj kial ĉio ĉi? Nur, por ke ni certigu la sangavidan regadon de niaj patroj. Ni bone konas la rezulton de la batalo: Abel estis mortigita. La venkinta Kain priploris sian fraton, ŝutis cindron sur sian kapon kaj laŭte anoncis al ambaŭ familioj, ke la malpaco estas finita, la pacrompanto jam ne vivas, estonte ili ĉasos kune, ĉiu el la du familioj havos abundan viandon kaj mielon de sovaĝaj abeloj. La malkonkordo finiĝis, la mondo atingis la eternan pacon.

— Sed el la pasinto ni ellernis, — li daŭrigis, — ke la paco estas granda trezoro kaj ni devas ĝin gardi pli bone, ol ĝis nun. Ni ne plu rajtas disiĝi al du grupoj, kaj tiun, kiu ne povas aliĝi al la nova grotreĝimo, ni nepre punos.

— Jen! — diris Hanok. — Mi jam diris, ke ĉio okazas nur por certigi lian tiranecon. Sango, kaj sklavkateno, ĉi tio estas nia sorto. Paco ja ne povas alveni ĝis ni ne sukcesos rompi ĉi tiun sangan tiranismon.

Pri ĉi tio konsentis liaj amikoj, kiuj nun plimultiĝis, ĉar kun ili konsentis la abelanoj, kiuj sentis sin subjugitaj. Ili publike mallaŭdis la kainanojn, post kio, la kainanoj deklaris, ke la amikoj de Hanok estas pacrompantoj kaj plurajn el ili mortbatis.

Ĉi tio kolerigis la amikojn de Hanok tiel, ke ili foje ŝtelis la poton de la veneno, mortisagadis la tiranon kaj liajn adeptojn.

Hanok do, transprenis la gvidadon. Li kunvokis la popolon kaj anoncis, ke la longa kaj sanga malharmonio ĉesis kaj post tiom da suferoj ekruĝis por la mondo la krepusko de la eterna paco.

— La tiraneco estas frakasita, — li diris. — Per tio ĉesis la kaŭzo, kiu incitis homon kontraŭ homfrato. Fine la homaro alvenis havenon kaj estas savita. La

mondo atingis la eternan pacon. Ni jam devas gardadi nur, ke regu nur la reciproka fratamo kaj paco. Por ni troviĝas jam nur unusola malamiko, tiu, kiu volas rompi la fratecan amon. Sed tiujn ni devas tute venki, por eviti, ke la adeptoj de la tiranismo malharmoniiĝu nian anaron kaj semu malpacon. Tiujn ni devas senpovigi, antaŭ ol ili povus subfosi nian fratan harmonion.

Pri ĉi tio ili konsentis, nur iu malnova amiko de Hanok skuis la kapon:

— Mi konjektas, - li diris, - ke ni esence nur ŝanĝis la tiranon, sed nenio vere modifiĝis. Ĉu ne, ĉi tiu Hanok parolas ankaŭ pri tio, ke ni devas venki iujn kaj senpovigi ilin? Ĝis nun ĉiu nia estro kredis, ke li posedas la panaceon, kiu alportos la eternan pacon. Sed ĉi tiu panaceo estis ĉiam iaspeca venko, kiun ni devas atingi super iu alia. Sed akiri venkon ni povas nur, se antaŭe ni trovas al tio malamikon. Laŭesence la malamikon ni mem kreis, por ke ni povu ĝin venki. Almenaŭ, se ni ekskrapis la ideon de la paco, sub la ekstera selo, ĉiam putriĝis sangaj bataloj. La eterna paco estas naiva ĥimero.

— Kaj ĉu ne troviĝas saviĝo? — ili demandis.

— Ne. La interbatado estas en la homa naturo. Oni devus modifi la homan naturon, por ke la malamo mem ĉesu.

— Kaj kiel vi imagas la solvon?

— Nu, atentu vi: ĉu vi ne ekvidis, ke Hanok kaj liaj intimaj amikoj estas ĉiuj blondaj?

— Vere.

— Nu, ni devas sperti, ke la malamon disvastigas la blonduloj. Do, la brunuloj devas solidari, venki la blondulojn, kaj tio ĉi alportos la eternan pacon. Sed ĝis tiam ĉio estos vanta ĥimero. Ek! brunaj amikoj, ni organizu nin por elbatali la venkon de la frateco, por ke jam fine ĉesu la malbenita spirito de la malpacigo!

Sed en tiu tago ankoraŭ neniu konsentis.

(1968)

Fonto: <http://esperanto-mv.pp.ru/Szathmari/index.html>

**L**a ŝipego nepercepteble proksimiĝis al la kajo. Fone, Port Said kuŝis plata, preskaŭ senkolora pro la blanka sunlumo de tagmezo. Etaj figuroj en galabioj diskuris senombre, sen videbla ordo aŭ celo.

Jam de du tagoj la vetero ĉiam pli varmiĝis, spite la marventon. Eĉ mia familiareco kun Egiptujo en aŭgusto ne estis povinta forigi neracian esperon, ke estos malpli varme surtere. Sed, kiel ĉiam antaŭe, Port Said tuj senluziĝis min; kaj mi malgajiĝis, pensante pri la longa relveturo al Kairo.

La tempo inter la eniro de l' ŝipo en la havenon, kaj la surteriĝo de la pasaĝeroj estas ĉiam tedega; oni sentas sin perdita inter du vivoj: oni ne plu estas unu el la pasaĝeraro, oni jam adiaŭis kvartagajn konatojn, kiuj pluiras al Hindujo; sed oni ankoraŭ ne havas la liberecon kaj amuzaĵojn de terano. Mi ekpomenis laŭ la ferdeko, esperante trovi alian perditan animon, kun kiu pasigi ĉi tiun unuhoran hadeson.

Baldaŭ mi vidis grupon bone konatan, por kiu evidente la atendo ne estis teda: s-ino Molard, la franca vidvino, Madeleno Molard, ŝia filino, kaj juna egipto, 1a fianĉo de Madeleno. Ili avide rigardis ĉiun detalon de la diskurado sur la kajo, la egipto ĉar li unuafoje en kvar jaroj revidis sian patrujon, la francinoj por ion scii pri sia nova hejmo.

Mi estis rimarkinta tiun grupeton jam en la haveno de Marsejlo. Kiam oni (aŭ, eble pli ĝuste, kiam anglo) suriras ŝipon, oni tuj observas la aliajn pasaĝerojn por vidi, kiujn oni devos eviti, kaj kiujn oni povos alparoli sen danĝero de tedado. Ĉiam (por anglo) la dua klaso estas multe pli malgranda, ol la unua. Al s-ino Molard mi tuj altiriĝis; ŝi estis parizanino, kun la spriteco, energiaj opinioj kaj inteligenteco de siaj samurbanoj. Ŝi havis, supozeble, kvindek jarojn, kaj ŝiaj haroj estis jam grizaj; sed ŝi estis konservinta sian firman karnon, ŝiaj mamoj ankoraŭ ne platiĝis, kaj ŝi havis rondajn brakojn, kiujn oni preskaŭ povus nomi belaj. Ŝiaj grandaj okuloj estis palgrizaj, rapidaj kaj komprenemaj. Mia restado ĉe la parizaj esperantistoj instruis al mi aprezi la francan spiriton; kaj spite la oftajn provincanecon kaj obstinon de la franca menso, mi sentis la bezonon, ofte min trempi en 1a franca animo, tiu kuraĝa, realista acido kiu ĉion provas. Mi do kaptis la okazon por alparoli s-inon Molard kiam mi trovis min apud ŝi ĉe la manĝotablo, kaj ŝi varme respondis, precipe tial ke ni estis sur angla ŝipo, kaj mi estis preskaŭ la sola persono kiu parolis la francan lingvon.

Ŝi havis ne tre precizajn, sed vastajn konojn, kaj ĉion priparolis kun refreŝiga skeptikeco. Kiel decas al

bone edukita francino de ŝia aĝo, ŝi estis ateisto, pacifisto dum oni ne atakas Francujon, kaj politike radikala, preskaŭ socialista. Kaj, ankaŭ kiel decas al francino de ŝia aĝo, ŝi parolis tre multe, en tre klara, bonstila franca lingvo; niaj konversacioj estis por mi granda plezuro.

Mi malpli ofte vidis Madelenon; tiutempe ŝi kompreneble tre okupiĝis pri sia fianĉo. Ŝi estis delikate formita, kun nigraj haroj, brunaj okuloj kaj tre pala haŭto. Ŝia korpo estis gracila, sed tro maldika, kaj ŝi estis tre platbrusta: ŝi portis okulvitrojn. Ŝi tiam havis proksimume dek-naŭ jarojn, kaj tre romantike amis sian egipton.

Ĉi tiu nomiĝis Muhammad Abd er-Rahman, sed Madeleno kaj ŝia patrino ĉiam nomis lin Moaméd, kun tiu franca provinceco, kiu ĉiam misprononcas fremdajn nomojn, kaj firme kredas, ke la vera nomo de la itala pentristo estas Le Corrège, kaj nur malkleraj italoj nomas lin Correggio. Muhammad estis bela junulo, dudek-kvarjara, alta, gracila, kun la larĝaj malgrasaj ŝultroj de egipto, kiujn akcentis la tajlora stilo de la Latina Kvartalo. Li tre franciĝis en Parizo, kaj oni povus kredi lin marsejlano. Mi ĝuste divenis lian historion; cetere, tia historio estas ne malofta ĉe parizaj studentoj, sed kutime finiĝas en pli frua stadio. Studento pri juro aŭ medicino loĝas en Parizo ĉe franca familio, kiu devas akcepti pensione gaston por streĉi siajn enspezojn ĝis la fino de la monato. En la familio estas filino: parizanino, kiun la egiptoj imagas al si la fonto de ĉia volupta plezuro, kaj por kiu multaj interŝanĝus eĉ la huriojn de paradizo. Ili ekamas unu la alian; fianĉiĝas; post la studjaroj, la studento (egipta aŭ alia) reiras hejmen, por sciigi sian familion pri la edziĝo – kaj tie la afero finiĝas. Ke en tiu ĉi kazo ĝi iris ĝis la fino, tion mi atribuis al la forta karaktero de s-ino Molard.

Kiam mi rigardis Muhammad-on, kaj notis denove lian agrablan brunan vizaĝon, kun belegaj nigraj okuloj, blankegaj dentoj kaj iom mallonga mentono, mi recertiĝis, ke nur la subtila insistado de Henrikinio Molard povus doni al li la kuraĝon, prezenti fremdan, nemahometanan fianĉinon al siaj gepatroj. Certe, Madeleno ne havas sufiĉan forton por tio, kaj estus facile permesinta al sia kavaliro forkuri. Madeleno estis inteligenta; nure, ŝia patrino monopolis la energion de la familio.

Mi aliris al ili apud la pavezo, kaj salutis s-inon Molard arablingve por ŝin inciteti: ŝi neniam volis lerni tiun lingvon, eĉ por kunvivado kun egipta familio, kaj post kvarjara restado en Egiptujo ŝi ankoraŭ parolis nur tri vortojn, kun fortega franca akcento. Ĉu mi ne



diris, ke ŝi estas vera francino?

"Said'ah, ja sit! Inti mabsuta del'ua'ti? Saluton, O virino, ĉu vi estas nun kontenta?"

"Se tio volas diri, ke mi ĝojos foriri de la ŝipo, mi jam ne estas certa. Sur la maro oni ĉiam povis esperi ŝtormon kun malvarma pluvo, sed tie ĉi eĉ glaso da biero vaporiĝus inter tablo kaj buŝo. Vi ne povas imagi al vi, s-ro Mansell, kiom mi sopiras al la koto kaj pluvo de Parizo. Mi eĉ ŝatus vane atendi malplenan aŭtobuson Al bis, dum la gutoj ruliĝas de kolumo al kalsono."

"Sed, mamam," diris Madeleno, "ĉu vi ne memoras viajn blasfemojn pri la malvarma kaj malseka vetero? Vi ĉiam diris, ke vi preferus iri inferen, ol sidi sur malsekaj nuboj en la ĉielo?"

"Opinioj, preferoj – ili estas nur geografiaj demandoj. Cetere, ne estas dece, ke filino malkaŝu la nekonsekvencecon de sia patrino."

"Vi trovos la egiptajn domojn tre malvarmaj," interrompis Muhammad. "Multaj havas tre dikajn murojn, kaj la fenestroj estas ĉiam fermataj dum la varma parto de la tago."

Sencele, mi demandis al mi, kiel li diris "egiptaj domoj", anstataŭ "mia – aŭ: nia – domo". Mi supozis, ke li ne kuraĝis averti la familion, ke li revenos kun estonta edzino; kaj antaŭtimante malpacojn, li ne volis turni siajn pensojn al sia hejmo eĉ en tia banala frazo. La timema menso scias sin protekti de la turmentaj aludoj.

Je tiu momento mi vidis la portistojn grimpantaj sur la ŝipon, kaj mi adiaŭis miajn kunulojn, promesante trovi ilin sur la vagonaro ironta al Kairo. Mi ne proponis helpon, ĉar Muhammad ja kapablis pli efike kaj malpli kare laborigi egiptan portiston, ol mi.

Post la polva lukto de la doganejo, mi iris kun malsekaj vestoj al la vagonaro, kaj facile retrovis miajn amikojn, kiuj, dank' al la arablingvaj malbenoj de Muhammed, estis liberiĝintaj pli frue ol mi. S-ino Molard kaj Madeleno sentis varmegaj, kaj ŝvitis, sed kiam la vagonaro ekiris, ili rapide reviviĝis por vidi la novan, misteran landon.

Por tiu, kiu devos vivi longe en Egiptujo, ne estas bone eniri la landon tra Port Said. Pli bona estas Aleksandrio; de tie oni laŭiras la Nilan valon, kaj ĉie vidas verdegajn kampojn, gracie altajn palmojn, bubalojn, vilaĝojn romantikajn kaj sufiĉe malproksimajn por ke oni ne vidu la malriĉecon de la enloĝantoj; mallonge, de tiu relvojo oni vidas nur tion, kion montras la turistaj poŝtkartoj.

Sed irante de Port Said, oni devas trapasi dezerton; senfinan, senkoloran, senvivan; oni ne vidas eĉ unu karavanon kun kameloj kaj tintantaj sonoriloj. Sed oni vidas kelkajn urbojn de proksime, el kiuj la

plej granda estas Zagazig. Mi konfesas, ke mi neniam vidis Zagazig-on krom de kupea fenestro; eble ĝi estas agrabla urbo. Sed vidate de vagonaro, ĝi estas timiga: kunpremiĝantaj domoj el kotbrikoj, ĉio griza, fenestroj ofte senvitraj, apenaŭ unu palmo por variigi la monotonecon. Kaj muŝaro eniras la vagonon, egiptaj muŝoj, kiuj ne kutimas esti forpelataj, kaj tute simple rifuzas foriri de oniaj buŝo kaj okuloj. Eble sur la perono oni vidas la bebon de malriĉulino, kun dekoj da muŝoj algluitaj al ĝiaj okuloj, kiun nek la patrino, nek la infano pensas forviŝi. Kaj oni estas surdigata de la kriegoj de portistoj, limonadvendistoj, knaboj, kiuj ŝajne utilas por nenio krom pliintensigi la bruon. Oni preskaŭ svenas en la senaera stacidomo, kaj oni subite konstatas, ke oni estas en tre, tre fremda lando, el kies lingvo oni komprenas eĉ ne unu vorton, kaj oni sentas sin senpova kaj tre vundebla antaŭ ĉiu eventuale danĝera konato. En tiu momento, oni sin demandas, ĉu valoras vojaĝi, kiam oni povus trankvile resti hejme.

Jen la unua impresoj; tute falsa, aŭ pli ĝuste, tre unuflanka: Egiptujo estas vere bela kaj gastama lando, kie ekzilitoj kredeble povas vivi pli feliĉe, ol en tre multaj aliaj landoj. Sed kiel tion povas scii la noveveninto? Kiel li povas scii, ke li baldaŭ ekamos la landon, kaj ĝin forlasinte, ĉiam sopiros reveni? Li konscias nur varmon, kaj muŝojn, kaj polvon kaj nekomprenablajn frazojn, kaj lia koro peziĝas.

Mi observis la francinojn, kaj povis vidi la kutiman efikon de tiu veturo; mi bone komprenis la sperton, ĝin trapasinte mem antaŭ kelkaj jaroj. Muhammad evidente ne komprenis tion, kion ili sentis; por li ĝi estis lando konata, hejmlando – kaj kiu konscias la bonaĵojn kaj malbonaĵojn de sia propra lando, aŭ ties efikon sur la fremdulo?

Mi provis forigi la malgajon, parolante pri la belaj grandaj butikoj de Kairo, kie oni povas aĉeti parizajn robojn; pri la ŝikeco de la urbaninoj; pri la parkoj, kaj la belaj pejzaĝoj apud Nilo. Tiu gvidista parolado ne multe feliĉigis ilin, sed almenaŭ ĝi fortiris ilian atenton de la terura dezerto ĉiam forradanta preter la kupea fenestro.

Post unu-du horoj la suno subiris, kun ĉiuj koloroj nekredeblaj de la turista poŝtkarto, la giganta egipta luno arĝentis, kaj la aero malvarmetiĝis. Baldaŭ ni komencis trairi kampojn, kaj povis vidi la lumetojn briletantajn en la kabanoj de la vilaĝoj. Tio estis por la ekzilitoj la plej bona medikamento: la mondo aspektis al ili pli familiara kaj pli komforta: ili komencis reordigi siajn harojn kaj forventumi la polvon de siaj vestoj. Madeleno reruĝigis siajn lipojn.

Mi adiaŭis ilin en la stacidomo de Kairo, sed zorgis havigi al mi ilian adreson, kaj ankaŭ la

permeson de Muhammad, ke mi vizitu ilin. Mi sciis, ke ili konas nenian krom Muhammad, ke ĉi ties familio parolas nur la araban lingvon, kaj ke la francinoj urĝe bezonos paroli kun iu ajn eŭropano post kelkaj tagoj. Eĉ se oni estas feliĉa kun fremduloj, oni nepre devas paroli kelkfoje kun samlandanoj; kaj por ili, meze de egiptoj, franceparolanta anglo estis samlandano.

Revidante miajn amikojn, preparante mian laboron por la estontaj monatoj, mi forĝis ilin dum kelka tempo; sed post unu semajno, mi trovis min libera unu posttagmezon, kaj decidis utiligi la permeson de Muhammad. Mi serĉis ilian adreson en mia notlibreto, kaj rimarkis, ke la domo situas en la plej malnova parto de la urbo, tio estas, la malplej eŭropaneca. Tio jam maltrankviligis min, ĉar eĉ tiu, kiu konas kaj amas Egiptujon, se li estas eŭropano ne povas feliĉe vivi en tiuj mallarĝaj, dense enloĝataj kvartaloj. Mi ektimis, ke mi trovos ilin sufiĉe malgajaj, sed la realo superis mian supozon.

Mi paŝis zorge tra la senaeraj, senpavimaj stratetoj. Ĉiuflanke troviĝis butiketoj, sur kiuj sidis turke vendistoj, fumantaj senfinajn cigaredojn. De tempo al tempo mi devis paŝi en pordotruon por ne esti renversita de la korbegoj portataj de trotanta azeno aŭ kamelo. Mi preterpasis multajn moskeojn, pli bone zorgatajn ol la domoj, kun la plej delikataj arabaj desegnoj ĉizitaj sur siaj muroj.

Ju pli mi proksimiĝis al la domo de Muhammad, des pli mallarĝaj iĝis la stratoj, kaj des pli ofenda estis laodoro de la rubo ĵetita sur la vojon. La domoj havis kvar-kvin etaĝojn, kaj oni vidis la sunlumon alte superkape; sur la strato oni marŝis en eterna ombro.

La domo estis granda, kvaretaĝa kiel la aliaj; konstruita el brikoj kun stuko, sur kiu oni reprezentis brikojn per kradlinioj kaj la nigrajn kaj blankajn ŝtonojn de araba arkaĵo. Demandinte, mi trovis la apartamenton sur la dua etaĝo; la ŝtuparo kiun mi supreniris estis delonge nelavita, kaj multaj ŝtupoj estis rompigitaj.

Mi frapis sur la pordo du-tri foje, sen rezulto. Fine, venis kaj ĝin malfermis dek centimetrojn juna knabo, en galabijo malpura; li rigardis min senesprime kelkajn sekundojn, kaj refermis la pordon. Konante tiun kutimon, mi atendis pacience ankoraŭ kvin minutojn, kaj tiam la knabo revenis por diri, ke mi eniru. Li montrogestis min en saloneton, kaj min lasis tie. Tipa ĉambro de la meza klaso egipta: senpolura trabplanko, tre pura, kun kelkaj persaj tapiŝoj; eŭropaj seĝoj brakaj kaj senbrakaj, kaj unu kanapo, ĉiam kovritaj per blankaj tolvoriloj, falantaj en rektaj linioj; muroj farbitaj blue, kun kelkaj familiaj fotoj, kaj du-tri sentimentalaj francaj poŝtkartoj, montrantaj geamantojn, kapon ĉe kapo, kun tre idiotaj esprimoj.

Sur kadroj, rozkoloraj kaj blankaj bantoj; sur tablo kaj piano, multaj etaj brodaĵoj, tute senutilaj. Tiaj ĉambroj donas al eŭropano la impreson pri ekstrema malkomforto, malgraŭ la pureco kaj la multaj mebloj.

Mi ne atendis longe. Baldaŭ eniris junulo dek kvinjara, videble frato de Muhammad. Li salutis min angle, kaj demandis, kion mi volas. Mi klarigis, ke mi deziras vidi s-ron Muhammad aŭ la francajn sinjorinojn.

"Jes, bone. Nu, mi ne scias, ĉu ili estas tie ĉi, mi iros vidi."

Ĉi foje mi longe atendis, kaj mi baldaŭ komprenis la kialon. De malproksima ĉambro sonadis disputo kolera; mi aŭdis virajn voĉtonojn – verŝajne de Muhammad – kaj virinajn, rekoneble tiun de s-ino Molard. De Madeleno mi nenion aŭdis. En mia ĉambro estis kompleta silento, eĉ la horloĝo sur la piano ne funkciis; nure, de tempo al tempo, la pordo malfermiĝis kelkajn centimetrojn, virina nazo enŝoviĝis dum ono de sekundo, kaj tuj retiriĝis, kaj la pordo fermiĝis senbrue. La mahometanaj virinoj ja ne povas renkonti kaj alparoli la virajn vizitantojn, sed ili ne estas sen scivolemo pro tio.

Kaj mian scivolemon – ĝin mi malfacile mastris. Estas netolereble aŭskulti kverelon pri kiu oni eĉ ne scias la kaŭzon, kaj en kiun oni ue rajtas interveni. Mi krucigis kaj rekrucigis miajn kruojn; volis fumi cigaredon, sed ne kuraĝis, ĉar en la ĉambro ne estis cindrujo. Tiel daŭris duonhoron.

Subite la bruo plilaŭtiĝis. Verŝajne oni malfermis pordon. Mi klare aŭdis la voĉon de s-ino Molard:

"Monsieur Moaméd, vi estas netolerebla. Estas hontinde! Vi trompis viajn gepatrojn, vi trompis min, vi trompis mian filinon. Monsieur, vi estas fripono!"

"Ha!" mi pensis, "'Vi trompis min.' La fianĉino ŝajne ne ludas gravan rolon."

Paŝoj aŭdiĝis ekster la pordo, kaj envenis s-ino Molard, kun fajrerantaj okuloj kaj ruĝetaj vangoj. Ŝin sekvis Madeleno, kurbe, senbrue, kun ruĝaj okuloj. Oni apenaŭ rimarkis ŝin. Kaj post kelkaj sekundoj envenis ankaŭ Muhammad, kun pardonpeto kaj forglitemo esprimataj per ĉiu linio de lia korpo kaj ĉiu gesto.

S-ino Molard ne atendis por saluti. "S-ro Mansell, ĉu vi iam aŭdis pri afero simila! Tiu ĉi sinjoro (la senfunda malestimo en tiu ce monsieur!) tiu ĉi sinjoro amuzis sin per tre gaja ludo. Imagu al vi: li ne kredis necese, ke li informu siajn gepatrojn pri nia alveno. Fianĉino tute ne kalkuliĝas kiel gravaĵo!"

Ŝi marŝis tien kaj reen leone. Ŝi pugnis siajn manojn, kaj momente mi ektimis pro Muhammad. Nekonsekvence mi rimarkis, ke eĉ en sia kolero ŝi parolis tre korektan, senslangan francan lingvon.

"S-ro Mansell, vi havas viajn sentojn pri la honoro. Eĉ post tiu fia ago, vi ne povas imagi al vi kion li faris al ni. Sinjoro, tiu bela sinjoro jam havas edzinon!"

Uf! Jen la afero; mi ja aŭdis pri similaj okazoj. Mi ekrigardis Madelenon: ŝi sidis kun klinita kapo, sur la kanapo; ŝiaj manoj kuŝis renversitaj sur ŝiaj genuoj.

"Ĉu vi iam aŭdis similajn aferojn?" S-ino Molard sin turnis subite al Muhammad, kiu sin retiris. "Kaj vi, se vi kredas, ke vi povas fari tiajn malhonestajojn, se vi kredas, ke tia konduto decas al bone edukita persono, permesu al mi vin informi, sinjoro, ke vi eraras!"

Muhammad suprenlevis 1a ŝultrojn kaj ridetis, laŭ la kutimo de egiptoj, kiuj volas sin senkulpigi, kaj diris "Ma'aliŝ!"

Inter siaj mil aliaj signifoj, tiu vorto ma'aliŝ signifas ankaŭ "ĝi ne gravas" aŭ "pardonu"; sed ĝia ĉiama efiko ĉe koleraj eŭropanoj estas tute senvortigi ilin pro kolero. Tiel ĝi efikis ĉe s-ino Molard; ŝi marŝis al la fenestro, levis la brakojn, kaj sufokate diris: "Mia Dio, mia Dio, mia Dio!"

Muhammad kaptis la okazon por diri al mi "Permesu!" kaj eliris el la ĉambro. Reveninte de la fenestro, S-ino Molard ŝajnis iom trankviliĝi; la ĉeesto de Muhammad estis nur ĵetinta pluan karbon sur la fajron. Madelena restis senmova; ŝi ŝajne ne rimarkis la foriron de Muhammad.

Iom post iom, el la vortoj de s-ino Molard, mi komprenis, kio okazis. La gepatroj de Muhammad ne sciis eĉ la tagon de lia alveno en Kairo, kaj kiam li kun la francinoj eniris la domon, ilin renkontis senkomprena silento, baldaŭ sekvata de senvorta malaprobado. La veturo tra la mallarĝaj stratoj, kaj la kreskanta malbonodoro, sufiĉe malgajigis la sinjorinojn; tia akcepto, kaj la konstato, ke eĉ ne estas por ili litoj en la domo, tute platigis ilin. Oni lasis ilin solaj en la saloneto, kaj ili pasigis du-tri malsatajn horojn, aŭskultante la kvereladon en apuda ĉambro. Mallumiĝis; oni ne alportis lampon; ili ekdormis sur seĝoj. Fine, Muhammad alportis kelkajn egiptajn manĝaĵojn kaj kafon; oni de ie trovis kelkajn lantukojn, kaj ili kuŝiĝis unu sur la kanapo, kaj la alia sur la planko. Ili estis tiom lacaj, ke ili ne povis postuli eksplikojn.

"Vi komprenas bone", daŭrigis s-ino Molard, "ke la proksiman matenon mi volis scii pri kio temas. Nu, li diris, ke liaj gepatroj baldaŭ alkutimiĝos al la afero, kaj ni devas pacienciĝi. Mi bone varmigis liajn orelojn, sed kion vi volas? Ni devis akcepti. Li montris al ni du-tri ĉambrojn de la domo, sed gvidis tiel, ke en aliajn ni ne iru. Tiam mi ne suspektis la kialon. Li denove prezentis al ni sian patron, sed tio ne multe utilis; li ne

komprenis la francan lingvon, kaj mi eĉ ne povis plendi al li."

Ŝi silentis momenton, kolere revivante tiujn scenojn.

"Ni restis en tiu ĉi ĉambro preskaŭ la tutan tempon. Ni ne povis eliri la domon, ĉar ni ne konis la urbon kaj ne parolis la lingvon. Kaj ja ne temis pri promeno kun tiu honorindulo, sinjoro Muhammad! Mi diris al Madelena, ke ŝi ne plu povas ami tiun friponon, kaj ju malpli ni vidas lin, des pli bone!"

Sin interrompis timena frapeto ĉe la pordo, kaj la plej juna frato eniris, portante pleton kun tri tasetoj da kafo kaj tri glasoj da akvo. Eĉ meze de interna milito, egipta familio ne povas forgesi siajn gastamajn devojn. S-ino Molard senpense prenis sian, kaj ankaŭ Madelena trinketis.

"Tiel daŭris ĝis hodiaŭ matene", reparolis s-ino Molard. "Mi estis scivolinta, kial oni ne permesis al ni eniri la aliajn ĉambrojn, kaj kial oni kuris por fermi pordojn, aŭ iun foraverti, ĉiufoje kiam ni ekpaŝis en la koridoron. Ĉi matene, post demandado, li iom post iom konfesis, ke li estas tute libera por edziĝi al Madelena, sed ke estas ia ĝenetaĵo – neniel grava! – li jam havas edzinon egiptan. Li edziĝis antaŭ ol foriri al Francujo."

Mi demandis, kiam ili intencas reiri al Parizo; evidente, ili ne plu povus konsideri edziĝon kun Muhammad.

"Al Parizo? Mi tion volus! Sed, sinjoro, mi elspezis miajn lastajn centimojn por la vojaĝo kaj la necesaj vestoj! Mi konservis sufiĉe por mia reiro, sed, kiel vi rimarkas, ni estas jam du por reiri. Se mi vidos Francujon denove, mi estos dankema!"

Mi demandis pri parencoj, amikoj, en Francujo; pri helpo flanke de la franca konsulo.

"Pardonu, sinjoro, sed ĉu mi estas almozulino? Ĉu mi akceptos helpon de homoj kiujn mi plejparte malestimas? Nu, ne! Ni devos mem eltiri nin el tiu ĉi afero. Sed mi plendos al mia konsulo, mi skribos al influaj homoj, oni faros bruon pri tiu ĉi skandalo! Jen la rezulto de tiu malsaĝaĵo, enpermesi ĉiajn barbarojn en Francujon!"

Mi provis mildigi ŝian koleron. Mi klarigis, ke Muhammad estas mahometano, kiu ja rajtas havi samtempe kvar edzinojn. Estas vere, ke la modernaj, edukitaj egiptoj tre malofte havas pli ol unu, tamen, Muhammad, laŭ sia moralkodo, faris nenion prihontindan, nenion kontraŭleĝan. Sed nenio povis mildigi ŝian indignon; cetere, mi ne tro multe insistis: la indigno estas tre bona bazo por la kuraĝo, kaj mi antaŭvidis, ke ŝi bezonos multe da kuraĝo. Tamen, mi ne menciis mian suspekton, ke ŝi mem grandparte kulpas; mi imagis, ke estis ŝi, pli ol Muhammad, kiu

persvadis Madelenon al edziĝo; ke nur pro timo al ŝi Muhammad daŭrigis la aferon ĝis vojaĝo al Egiptujo, kaj ne kuraĝis konfesi la veron pli frue.

Ŝi informis min, ke ŝi intencas resti en tiu domo por ioma tempo, pagante luon de la ĉambro el sia malmulta havaĵo, kaj serĉi laboron kiel tajlorino por sinjorinoj; jam ŝia profesio en Parizo. Ŝi ne plu estis ekscitita, sed mi vidis en ŝi brulantan kuraĝon kaj decidemon, kaj mi ne plu timis pro ŝi.

Pri Madeleno mi estis sufiĉe maltrankvila. Dum nia interparolado, s-ino Molard kaj mi forgesis pri ŝi – la persono plej koncernata en la afero: fakto signifoplena. Estis io, pli grava ol la nuna ŝoko, seniluziigo, malfeliĉo: rigardante ŝin, mi sentis, ke la risorto en ŝi rompiĝis. Si kvazaŭ nevidebliĝis en la ombro de sia patrino: malsaneca stato por ĉia ajn fraŭlino.

Nu, mi nenion povis, krom viziti ilin de tempo al tempo, kaj diskrete flustri ion pri ili al miaj konatinoj, por ke ili mendu ĉe s-ino Molard siajn robojn. Tion ili efektive komencis fari, ĉar ŝi havis la bonan guston, la modecon de la parizano; kaj ŝiaj roboj ne estis multkostaj.

Eĉ la parencinoj de Muhammad mendis ĉe ŝi robojn, post senfina marĉandado, ĉar ankaŭ la mahometana virino kiu neniam eliras sen vualo, scias pri la parizaj manieroj, kaj nur malofte havas la okazon fariĝi ilin ĉe ververa pariza modistino.

Inter la Molard-oj kaj la familio de Muhammad stariĝis ia militpaŭzo; ili neniam estis amikoj, sed ili tolere traktis unuj la aliajn. Unufoje, kiam mi iris al la domo, mi trovis kun ili egiptan kuraciston, kiu, studinte la medicinon en Parizo, parolis la francan lingvon tre flue. Li estis onklo de Muhammad: viro altstatura, proksimume kvindek-kvinjara, kun grizaj haroj, maljunula voĉo, kiu tamen portis sin tre rekte. Li ĉiam surprizis min kiam li parolis: lia aspekto, kun fezo, estis la aspekto de egipto, sed la opinioj esprimataj estis la senreligiaj, skeptikaj opinioj de franco. Alian fojon mi tie renkontis egipto-judan advokaton, kies amatino aprezis la laboron de s-ino Molard; aŭ unu el tiuj virinoj, oftaj en Kairo, kiuj povus esti italaj, francaj, sirianaj, grekaj aŭ judaj, kiuj parolis la specialan francan lingvon de Kairo, kun tute speciala kaj abomeninda akcento.

Tamen, mi neniam renkontis ĉe s-ino Molard francojn; mi suspektas, ke ŝi intence evitis ilin, por eviti samtempe help-proponojn kaj kompaton.

Post kelkaj monatoj, kun la kunlaborado de Madeleno, kiu ankaŭ estis kompetenta kudristino, ŝi havis sufiĉe grandan klientaron por translokigi sin al la eŭropa kvartalo, kie la stratoj estas larĝaj kun multaj arboj, kaj kie loĝas la serĉindaj klientoj.

Ne ĉiam la aferoj marŝis bone; estis monatoj, laŭ mia scio, kiam ĉe la fino ne restis unu piastro por manĝaĵoj. Sed ili konstante rifuzis helpon, kaj dum la lastaj du-tri tagoj de la monato, kiam ili atendis la salajrotagon kiam klientoj povas pagi sian konton, ili tute simple ne invitis gastojn, kaj tute simple ne manĝis.

Mi fariĝis intima amiko al ili, kaj tre ofte iris al ilia eta apartamento por babili, kaj aŭskulti la opiniojn, juĝojn kaj memorojn de s-ino Molard. Mi ekkonis ŝian aventur-plenan vivon; instruistino, laboristino en fabrikejo, popeca faristino de mansakoj, zonoj kaj aliaj desegnaj ledaĵoj; organizantino de franca hospitalo dum la milito kaj flegistino proksime de la fronto; instruistino pri vestotranĉo; sukcesa modistino en Parizo. Kiel ofte ĉe la rakontemuloj, ŝi plurfoje ripetis la saman historion, kaj Madeleno, kiu atente aŭskultis ĉiun rakonton eĉ la dekan fojon, ofte interrompis por diri, "Sed ne, maman, vi faris tiun ekskurson dum vi estis en Compiègne en 1917; en januaro 1918 vi estis jam en Parizo", – aŭ similan korekton pri detalo. Ke Madeleno iam havis vivon propran, kun privataj intereso, pensoj kaj aventuroj, tion mi neniam sukcesis eltrovi.

Madeleno refortiĝis grade, kaj, mi kredas, tute forgesis sian seniluziigon pri Muhammad. Post longa serĉado ŝi trovis laboron por iu efemera revuo; ŝi skizis desegnetojn por reklamoj. Tio iom kuraĝigis ŝin; ŝi korektis la rakontojn de sia patrino pli gaje, kaj eĉ kelkfoje eldiris rekte siajn proprajn opiniojn – ĉiam kun rigardo al la patrino ĉe la fino, kaj pardonpetema "Ĉu ne, maman?"

Sed tiu laboro ne daŭris longe; mi kredas, ke la direktoro de la revuo postulis tro intiman servon, krom la rutina desegnado; kaj Madeleno, serioza fraŭlino, estis senlabora. Ŝi longe serĉis alian okupon, sed ne trovis, kaj reiris al kudrado por la patrino. Rekompence, nelonge poste, s-ino Molard dungiĝis kiel sub-instruistino en iu franca lernejo por knabinoj: laboro malpli laciga ol kudrado, kun enspezo pli certa.

Bona afero, mi pensis; ili jam staras firme sur la piedoj. Tamen, mi ankaŭ rimarkis de tiu tempo subtilan ŝanĝon en la rilatoj inter patrino kaj filino. S-ino Molard laboris ekstere la tutan tagon; Madeleno, domestrino, restis hejme, kuiris, purigis, kudris robojn kiam tiajn oni kelkfoje mendis: ili ne gajnis sufiĉe por dungi indiĝenan serviston, kiel ĉiuj aliaj eŭropanoj. S-ino Molard parolis pli tenere al Madeleno, provis paroligi ŝin, kiel karan malfortulinon kiun oni devas kuraĝigi; indulgis ŝin. Madeleno interesiĝis tute pri sia mastrumado, ŝajnis eĉ pli dependa de sia patrino. Mi ofte havis tiutempe antaŭ miaj mensaj okuloj la bildon: Madeleno sidanta kun klinita kapo, kudrante, dum ŝia

patrino diskutas pri politiko, scienco, religio, kun la viraj vizitantoj.

Kun io simila al la malespero, mi subite konstatis, nome, ke la rilato inter tiuj du virinoj ŝanĝiĝis al la rilato de edzo kaj edzino. La forta karaktero, la energio, la protektemo de 1a patrino, pliemfazis la virinan rolon de ŝia filino, samtempe neniigante ŝian esencan virinecon. Mi tremis kiam mi pensis pri tiu hejmo.

Mi deziris, ke Madeleno edziniĝu, sed kion fari? Ilia ekzisto estis tia, ke ili neniam renkontis junulojn edzigeblajn. Kion fari? Mi ne povis altiri junulojn per la haroj, kaj ordoni, ke ili edziĝu al Madeleno Molard.

Tamen, estis io; kvazaŭ malespera espero. Preskaŭ ĉiufoje, kiam mi vizitis la Molard-ojn, mi trovis d-ron Sajed, la onklon de Muhammad, jam instalita en la malgranda saloneto, parolanta facile kaj amike al la du francinoj. Li havis kvindek kvin jarojn, kaj mi ĝenerale abomenas la edziĝojn de maljunuloj kun junulinoj; aliflanke, li estis fortika, inteligenta, mense eŭropana, kaj mi pensis, ke eĉ tia mezaĝulo estas preferinda kiel kunulo por Madeleno, ol ŝia patrino. Kaj ankaŭ miaj ŝato kaj respekto al li helpis modifi mian abomenon. Mi do aprobe observis la progreson de la novaj rilatoj, kaj esperis.

La rezulta ŝoko estis tiom pli granda. Post kelkaj monatoj, mi ricevis unu matenon leteron. Ĝi tekstis jene:

*Mia kara amiko.*

*Mi nun skribas por anonci al vi mian fianĉiniĝon al d-ro Sajed Ali, kiu estas malnova amiko komuna al vi kaj al ni. Nia edziĝo okazos post tri semajnoj, kaj estas al mi plezuro anonci ĝin al vi antaŭ ĉiu alia, por ke vi partoprenu mian feliĉon, ĉar vi ja estis nia unua amiko en Egiptujo. Mi esperas, ke vi povos ĉeesti la*

*ceremonion, kaj mi poste sciigos vin pri la detaloj pri loko, dato, k. t. p.*

*Ĉiam via amikino,  
Henriette Molard.*

Ŝoko tio ja estis. Ĝi tute senspirigis min dum kelka tempo. Kiel mi povis esti tiel blinda? Kiel mi povis supozi, ke iu ajn rimarkos tiun mildan knabinon, kiam ĉeestas tiu fonto de energio kaj forto, ŝia patrino?

Nu, demandoj kaj supozoj neniel ŝanĝos aferojn; mia devo estis iri kiel eble plej frue por gratuli la feliĉan edziniĝontinon. Mi iris la saman vesperon, sed trovis Madelenon sola en la domo; ŝia patrino estis elirinta por anonci la novaĵon al aliaj amikoj.

Madeleno estis ŝanĝita. Ŝiaj okuloj brilis, ŝiaj vangoj estis ruĝetaj pro ekscito.

"Ĉu ne belega afero, s-no Mansell? Mi estas tiom ekscitita. Mi restis hejme ĉi vespere por daŭrigi la kudradon de la edziĝ-robo; kiel vi rimarkas, estas jam tre malmulte da tempo. Rigardu ĝin! Ĉu ne bela? Mi intencas brodi ornameton tie ĉi; ĝi estos aminda robo, kreu al mi!"

Mi iom babilis kun ŝi; ŝajnigis entuziasmon; petis, ke ŝi esprimu al la patrino miajn gratulojn; kaj foriris – resti longe kun ŝi estis ekster mia povo.

Sed dum sufiĉe longa tempo mi ne povis forgesi tiun knabinon tute ekscititan pri edziĝ-robo – de sia patrino.

de **L.N.NEWELL**

Aperis en Bakŝiŝ: skizoj el la vivo de egiptoj, Literatura Mondo 1938, Dua eldono Iltis 1983

Fonto: <http://esperanto.net/literaturo/noveloj/06.html>



## Ne forgesu mian voĉon

-- nova Libro de Julian Modest

Aperis nova Esperanto-libro de Julian Modest, kiu enhavas du novelojn.

En "**Ne forgesu mian voĉon**" estas amo, sekretoj, mistero. La pentristo Veselin kaj la ĵurnalistino Milena renkontiĝas, konatiĝas, ekamas unu la alian, sed ilia amo ne daŭras longe. Subite Milena malaperas. Iu verŝajne murdis ŝin. Veselin vane serĉas ŝin. Restas nur la rememoroj pri Milena kaj la sola deziro de Veselin neniam forgesi ŝian voĉon.

En "**Aŭtuna ferio**" la ĉefheroo Martin estas talenta verkisto. Por finverki sian novan romanon li iras en belan maran ripozejon, luas hotelan ĉambron, esperante, ke en silento kaj trankvilo li daŭrigos la verkadon. Tamen tie li renkontas allogan enigman junulinon kaj okazas kelkaj strangaj eventoj.

La du noveloj ravas per streĉaj intrigoj kaj modela Esperanta stilo.

La libron eldonis Eldonejo "**Libera**", Belgio. La libro estas aĉetebla ĉe la eldonejo kaj ĉe UEA.

**M**ez-epoka poeto zorge priskribis «teruregan neĝvirinon»

Ne nur en Himalajoj, ne nur en Kaŭkazo kaj Siberio, sed ankaŭ en Eŭropo renkontiĝis la tiel nomitaj de la gazetistoj «teruregaj neĝhomoj». Fakte la legendojn helenajn pri la silenoj saturoj kaj dio Pan konjekteble kaŭzis renkontoj kun tiuj vilaj longorelaj, krure lertegaj, sekse sentabuaj (parenteze ni memoru la terminon «nimfomanio») estaĵoj (la lastdata, historia, ne legenda, okazo tia disvolviĝis en Ilirio, proksime de Dyrhachium, «saturo» kaptita en loko «Nymfaeum» far la soldatoj de la fama romiana politikisto Sula (alie: Sylla), kiu taksis ĝin multe malpli bela ol tiuj bildigitaj de la artistoj!). Sed eĉ ĝis la mez-epoko ili vivis en la Pireneoj (probablas ke la plej lasta manifestiĝis en Eŭskiaj montoj dum la dekoka jarcento) kaj trubadora literaturo parolas pri ili, precipe dum la dekkvara jarcento la hispana verkisto Juan Ruiz (Ĥuan Ruis), en sia «Libro de buen amor» (libro de bona amo) parolas pri la «serranas» virinoj kiu vivadas en la montaro (kiel ilia nomo diras: monĉenloĝanoj) de Guadarrama. Jen la strofoj, kie li priskribas unu el ili, amasigante la detalojn, kiel gazetisto aŭ policisto, aŭ kiel homo kiu vidis ion eksterordinaran kaj volegas zorge konservigi kaj diskonigi la informojn:

*«En Apokalipso de sankta Johano la Evangelisto,  
Oni ne vidas tia figuro nek tiom terura bildo  
Se multnombros kaŭzus ĝi egan lukton, egan  
konkeron.*

*Ne sciĝas de kiu diablo tia fantomo povus amati.*

*Ŝi havis la kapon tre granda, superproporcia,  
Hararon nigrega tiel, kiel glima korniko,  
Okulojn enprofunditaj kaj ruĝaj, ne tre distingeblaj,  
Ŝia paŝosigno pli grandas ol tiu de ursino.*

*La orelojn tiom grandaj, kiom tiuj de unujara azeno,*

*La kolon nigra, larĝa, vila, malgranda,  
La naztruojn tre larĝaj, tiuj de kurlo ;  
Ŝi trinkus post kelke da tagoj la tutan akvon de marĉeto.*

*Buŝon kiel dogo, kaj vizaĝo tre granda,  
La dentoj larĝaj kaj longaj, ĉevalecaj, misaranĝitaj ;  
La brovojn larĝaj kaj pli nigraj ol turdoj ; .....*

*Ŝi havas lanugon el barbharoj ege nigraj, .....*

*Sed se paroli vere, se mi bone vidis ĝisgenue,  
La ostoj estas grandaj, la kruro ne tre malgranda.....  
La maleoloj pli grandaj ol tiu de unujara bovidino.*

*Pli larĝan ol mia mano ŝi havas manartikon,  
Vila, per longaj haroj, sed ne tre seka  
La voĉo basa, laŭta kaj nazaleca,  
Lenta kiel cervobleko sen gracieco kaj kavece  
sonanta.*

*Ŝia malgranda fingro pli grandas ol mia dika fingro...*

*Ŝi surhavas kiel veston siajn mamojn pendantajn,  
Kiu atingas ĝis la zono.....*

*Ripoj grandegaj en ŝia nigra brusto,  
Unu tiomas tri ....»*

La detaloj ĉi-supre listigitaj ekzakte kongruas kun la priskriboj de la modernaj atestantoj, ekzemple en Kaŭkazo aŭ Pamiro.

tradukis kaj sendis **Roland Platteau** el Francio



**18>>** radioaktiveco el la atombombo. Tiutempe mi eniris en la urbon pli ol 10 fojojn.

Mi opinias, ke la tasko de la atombombitoj estas rakonti kuelan realon de atombombo. Mi esperas, ke plej multaj ŝtatestroj vizitos la muzeojn de atombomboj kaj scios la realon de la damaĝoj, aŭskultante rakontojn de atombombitoj. Precipe mi forte deziras, ke la japana registaro montru sian decidon kontraŭ nukleaj armiloj. Mi tre bedaŭras, ke ĝi ĉiam sekvas la usonan politikon.

**La japana registaro fanfaronas, sed nenion faras**

Jene la japana registaro parolis en la Unuiĝintaj Nacioj:

*“La japana registaro respondeca pri la vivo kaj proprietaĵoj de la japanio taŭge alfrontas al la reala danĝero, sincere trabatos la vojon al redukto de nukleaj armiloj, ludos la rolon de peranto inter landoj posedantaj nukleajn armilojn kaj landoj subtenantaj tiun pakton kaj strebos realisme, praktike kaj persiste por la celo.*

*Sed mi neniam aŭdis, ke ĝi faris ion por abolo de nukleaj armiloj. La ĉefministro Abe estas lojala hundo de Trump, do li ĉiam sekvas la mastron, neniam kontraŭbojante.”*

**E**n malproksima angulo de fruktĝardeno, sekrete kunvenis la edzoj de la vilaĝo, famaj pro sia procedemo antaŭ la volo de siaj edzinoj. Ĉiuj interkonsentis, ke necese estis forskui la netolereblan virinan jugon kaj, tiucele, fondi firman interhelpan asocion.

Ili estis pesantaj la meritojn de ĉiu membro por la elekto de unu prezidanto, kiam la gvatisto kriis alarmon:

La malamikinoj! Ni forsaviĝu!

Kaj ĉiuj vete forkuris... Sed, tio estis nur falsa alarmo. Reveninte al sia grava kunveno, ili vidis unu

el ili trankvile sidata sur sia loko.

Jen la plej kuraĝa el ni ĉiuj; li indas esti nia prezidanto!

Ĉiuj alproksimiĝis por lin aklami. Ho ve! la bravulo estis jam mortinta pro timego.

Eltiraĵo el Ridi Vjetname eldonita en 1981 de Fremdlingva Eldonejo

Fonto: <http://www.kunlaboro.pro.br/esperanto/ridi-vjetname/la-plej-kuragxa/>

### Vortareto

- \* **aklami** - per favoraj krioj akcepti, saluti.
- \* **alarmo** - averta sono, informanta pri minaca danĝero.
- \* **fondi** - krei kaj aranĝi institucion.
- \* **forskui** - rapide kaj krude skui, por forĵeti.

\* **gvatisto** - soldato, kiu kaŝite en taŭga loko (turo, arbobranĉoj, termonteto) observas la movojn de la malamiko por alarmi en okazo de atako.

\* **kuraĝa** - trankvile energia antaŭ malfacilaĵoj, ofendoj ktp.

\* **pesi** - juĝi la meritojn kaj malmeritojn de homo.

volis eliĝi. El la kelo li elrampis al la porluma ŝakto. La eksteran fenestron, kiu rigardis al la porluma korteto, li rompis, la internan li enpuŝis, kaj kun granda krakbruo li falis en nian banĉambron.

Kvaronhoron daŭris la priaŭskulto, kaj estis necese decidi, kio okazu al li.

Ŝajnis, kvazaŭ la okuloj de mia pli juna, 14-jara filo estus larmoplenaj. Kelke da cigaredoj mi enmanigis al la arja knabo kaj donis al li jenan instrukcion: „Laŭ la sama vojo, kiel vi envenis, vi devas forlasi la banĉambron.“

La knaboj ankoraŭ helpis lin sur la fenestrorandon, kaj la armita reprezentanto de la germana imperio malaperis el la teritorio de juda superregado.

Eble ankaŭ ni traktis lin krude, kiam ni transdonis lin al la sorto, donante al li nek bonajn konsilojn nek kelkajn vestopecojn, por ke transvestiĝinte civilulo, li povu forkuri de antaŭ la rusoj.

Kiel pseudokristanoj, ni ne atingis tiun kristanan alton, ke kiu surĵetas vin per ŝtono, tiun vi resurĵetu per pano.


Ni konversaciis pri la sorto de germanaro. Kia kruta vojo kondukis malsupren de la Germanio de Goethe, Schiller, Beethoven, ĝis la malgranda soldato de la hitlera Germanio! Ĉe la komenco de la hitlerismo neniu povus antaŭdiri tiun ĉi kataklismon. Eĉ Hitler mem ne.

\* *taliono* - repago de krimo, laŭ principo de diversaj juraj sistemoj, i.a. la Mosea kaj la Romia (la t.n. *lex talionis*), laŭ kiu la kulpulo devas suferi tiun saman malbonon, kiun li kaŭzis: „okulon pro okulo, denton pro dento.“

Fonto: **Legolibreto 1** de Jindřiška Drahotova



### Solve de la krucvortenigma



## Ero el la libro

## „Modernaj Robinzonoj en la siberia praarbo“

Dro. Teodoro Schwartz 1924

La maljuna araĉono montris la lertan, artifikan buĉmanieron. Preninte hakilon, ŝtelirante li alproksimiĝis kaj haltis malantaŭ la cervo. La cervo staris milde, per siaj senkulpaj okuloj ĝi rigardis nin kiel amikon kaj eĉ ne suspektis, ke ĝia vivo tuj finiĝos. La maljunulo per la malakra rando de la hakilo frapis tute malforte la kapon de la cervo. Verŝajne li trafis la oblongan cerbon, ĉar la cervo tuj falis kaj mortis. Kvazaŭ vulturoj al kadavro, tiel parto de ĉeestantoj atakis la mortintan cervon. Ili suĉis la sangon kaj ne kuiris, sed tuj krude ekmanĝis la karnon. Mi neniam imagis, ke la homoj, se la sociaj katenoj iomete malligiĝas, tiagrade fariĝas bestaj. Sur la dispecigita cervo montris al mi araĉono, kial la cervoj ne povas longe kuri dum somero. La nazo de la mortinta cervo estis plena de parazitaj, kiuj malhelpas la spiradon. Dum vintro la parazitaj ne povas rezisti la malvarmon kaj pereas. Tial povas kuregi la cervo vintre. Ĝi faras tage po 100-120 verstoj. Ni vane petis, ke ili pruntedonu al ni cervojn ĝis la rivero Vitim; ili ne konsentis, ĉar laŭ ili la cervoj ne taŭgas somere por la longdaŭra vojaĝo. Nur la maljuna araĉono montriĝis ema veni kun ni kiel gvidanto, kiam ni promesis, ke ni donacos al li nian tendon.

Je la sekvinta tago, frumatene li vere estis preta gvidi nin. Li kunprenis nur tri faritajn el cervfelo pantoflojn.

„Ete sufiĉos sur la vojo,“ li diris araĉone. Li ekiris kaj la karavano sekvis la maljunulon.

## Ero el la libro „Maskerado ĉirkaŭ la morto“

Tivadar Soros

## La 12-an de januaro 1945

Jam estis tria tago, kiam ni ne forlasis la domon, kaj la plejparton de nia tempo, escepte la aerumadon sur la korto, ni pasigis en la ĉambro. Ni estis vestitaj pli varme ol kutime, kvazaŭ ni ekirus por skii, ĉar tra la fenestro forte influis la malvarmo. El la direkto de la strato estis aŭdebla ofta klakado de peza maŝinpaŝilo. Por legi ni ne havis emon. Sed por la meditado ni havis multege da tempo. Tiu militstato, en kiu ni vivis ekde la invado de la germanoj, ŝanĝis mian

sentomondon. Tio, ke mi vivis kiel persekutato, iom post iom pliintensigis mian kunsentemon: la afero de ĉiu persekutato fariĝis ankaŭ mia afero. Pro la kruela traktmaniero de la japana registraro hontis mi; la gravaj dekretoj aplikataj kontraŭ la sudafrikaj negroj ofendis ankaŭ min. Kvazaŭ mi sentus min respondeca por la tuta mondo. Estas la hodiaŭa restaĵo de tiu sento, kio devigas min transdoni mian sidlokon al maljuna negrino en la troŝtopita Subway, se ŝi aspektas laca; aŭ se mi aŭdas historieton, en kiu mi trovas spontan manifiestiĝon de boneco, miaj okuloj tuj pleniĝas de larmoj.

La malamo neniam kaptis min. La hitlerismo pereigis multajn el miaj karaj amikoj kaj du miajn fratojn. Sed la hitlerismon mi ne povis identigi kun la germana popolo. Mi provis eduki ankaŭ miajn filojn en tia spirito.

Kvazaŭ la sorto volus elprovi mian sintenon en tiu tago, el la direkto de nia banĉambro aŭdiĝis laŭta ekkrako. Kio okazis? Unu el miaj filoj enrigardis kaj ekscitite raportis:

„Germana soldato estas en la banĉambro.“

Ni ĉiuj eniris. Tie staris bluokula, blonda, germana knabo en plena milita ekipaĵo. Eĉ barblanugojn li ne havis sur la mentono.

La fenestro de la banĉambro, kiu havis ne travideblan vitron, neniam estis malfermita. Nun ĝi staris malfermita.

La hazardo aranĝis tiel, ke tiu ĉi germana soldateto, kiel reprezentanto de la germana potenco, nun trovis sin antaŭ kvar judoj, kiuj nun havis la eblon trakti lin kun la samaj barbereco kaj sensenca malicego, kiel la germanoj traktis milionojn el la judaro.

Kun siaj bluaj okuloj kaj blondaj haroj li ŝajnis enkorpiĝo de tiu arjeco, kies fanatikuloj volis sklavigi popolojn, ekstremi rasojn. Ĉu trakti lin laŭ la taliono? \* Ĉu li mem estas kulpa? Ĉu licas lin puni pro ago, kiun li eble ne faris, eĉ ne aprobis? Sed ĉu la 'arjoj' pensadis la aferon tiel skrupule?

Nu, ni faris nenion malbonan al la junulo.

„Wie alt sind Sie?“ estis mia unua demando.

„Mi estas en mia deksepa jaro,“ li respondis servoprete.

„Ĉu vi fumas?“

„Jes.“

Li ricevis cigaredon, ekbruligis ĝin, avide ekfumis. Poste li rakontis, ke antaŭ nia domo staras rusa tanko. (La pafado de ties maŝinpaŝilo estis aŭdebla ĉe ni.) De antaŭ rusoj li rifuĝis en la kelon de la domo, de kie li

